



GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

TEATRO : Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *J. Flourens* (FRANCUJO).

FELIETONO : La fratoj de Mowgli, el « la libro de la Ĵunglo », de *Rudyard Kipling*, tradukita de *C. W. Oxenford* (ANGLUJO).

ĈIULANDA LITERATURO : Kial li ne povas rigardi razilon, de *J. Schröder* (AŬSTRUJO).

KOMERCO KAJ INDUSTRIO : Diamantoj kaj diamantistoj, de *Maurice David* (FRANCUJO).

DIVERSAĴOJ : La antikvaj svedaj mitoj, de *H. Lindstedt* (SVEDUJO).

SPORTOJ : Kroniko, de *L. de Guesnet* (FRANCUJO).

PRI ESPERANTO : Bibliografio : La faraono, Duonsurda — Kroniko, de *A. Montrosier* kaj *Steletto*.

KURIOZAJ KUTIMOJ : La kandelfesto, de *J. Flourens*.

MIKSAĴOJ : Ludoj, konkursoj, de *Ch. Brunet*.



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.)
La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landojne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Augusto.

ATENTU, Sinjorino

ekdikigas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata franke la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de 10 fr. Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY**.

ASP KANDELLANTERNOJ por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza, Oportuna, Pura, Neestingeblo en Ventego. Funkciadas bonege nur kiam oni uzas la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague. DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sr G. RUTTER, 30, Red Lion Squar, LONDON.



VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78^a milo franca tradukis

EMILIO GASSE

sendeblo ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe ĉiuj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Islanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sr Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonnu aŭ reabonu senpere pro la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O.), France.**

Urgaj seiĝoj: **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGĪ.



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. —

11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo
prenita en S^t Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet

S^t Etienne (France).

TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	ANONCOJ: (33 literoj)	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.
		Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
		Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
	REKLAMOJ (50 literoj):	2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 cm. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de l' monato.

NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-
araj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj:
li ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havi ĝi
latulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentigi: ni rekomendas ankaŭ tiujn
anoncetojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj
grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn
korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

Internaciaj vojaĝoj je laŭvolaj vojaroj.

Ĉiuj stacidomoj de l' grandaj francaj relretoj, kaj ĉiuj vojaĝagent-
ejoj liveras, la tutan jaron, libretojn por internaciaj vojaĝoj je voj-
aroj redaktitaj laŭ la volo de l' vojaĝantoj, kaj povantaj konsisti el
suriroj:

a/ sur la vojaro de l' grandaj francaj relretoj, de l' relretoj alĝeriaj
kaj tunisiaj, kaj de l' korsikujaj relretoj;

b/ sur iaj maraj linioj, k. c. . . ;

c/ sur la fervojoj Eŭropaj, escepte la anglaj, hispanaj, portugaliaj
kaj rusaj. La vojplano de la vojaĝoj komencontaj en Francujo, Al-
ĝerio, Tunizio, Korsikujo aŭ Italujo, devas enhavi devige fremdajn
trairojn. La vojararo devas, ĉiuokaze, rekonduki la vojaĝanton ĝis
lia deirpunkto.

Suriro minimuma taksata: 600 kilom. — Uzebleco: 60 tagojn ĝis
3000 km., 90 t. de 3001 ĝis 5000 km. kaj 120 t. post 5000 km.

Laŭvolaj haltoj ĉe ĉiuj stacidomoj de la vojararo.

Petoj pri internaciaj libretoj faritaj antaŭ tagmezo estas plenum-
ataj samtage ĉe Paris, Nice kaj la vojaĝagentejoj. Ĉe ĉiuj aliaj
stacidomoj, ili devas esti faritaj almenaŭ 4 tagojn antaŭe. Por aliaj
landoj, oni devas aldoni la sendtempojn.



DIVERSAĴOJ



La antikva sveda mito.



Niaj antaŭuloj kredis al multaj dioj. Kiel ili ŝatis tiujn ĉi, kaj tio kion ili kredis pri la komenciĝo kaj finiĝo de la mondo, ni ekscias per kolekto da antikvaj kantoj, kiuj estas notitaj kaj konservataj en Islando. La kolekto estas nomita *Eddan*.

Laŭ la kredo de niaj antaŭuloj ekzistis, je la naskiĝo de la tempo, du mondoj, nome *Muspelhem* aŭ fajra mondo, kaj *Niflhem* aŭ malluma kaj malvarma mondo. Ambaŭ mondoj estis disigitaj per granda profundegaĵo, kiun oni nomis *Ginnungagap*. En la profundegaĵo interrenkontis sin la neĝo de *Niflhem* kaj la fajreroj de *Muspelhem*: el tio formiĝis la

grandegulo *Ymer* (li estis la naska patro de la grandegularo), kaj la bovino *Odhumla*; de ŝi devenis ĉiuj *Asarne* aŭ dioj. La tero, laŭ la legendo, formiĝis kiam la dioj mortigis *Ymer*, kondukis lian korpon en la malplenan universon, kaj el li kreis la teron kaj la ĉielon; poste ili kreis sunon kaj lunon, por lumi sur la ĉielo. Pri la kreitaro la antikvaj kantoj rakontas tiel:

El viando de la grandegulo.
Faris teron
Kaj maron el lia sango.
Arbaron el la haro
Kaj monton el la ostoj.
Sed el la kranio ĉielon.

Kaj el liaj brovoj
Faris bonaj dioj
Midgard al la homoj;
Kaj el lia cerbo,
De la ĉielo ĉiujn
Malhelajn nubojn kreis.

Unufoje la dioj trovis sur la bordo du arbojn, kiujn ilin nomis *Ask* kaj *Embla*; el ili, ili kreis la unuajn homojn. La homoj nomis la mondon *Midgard* aŭ *Manhem*. La dioj mem loĝis en la ĉielo *Asgard* kaj regis de tie la mondon. Sed ili ne estis ĉiopovaj; ĉar ili devis obei je la tri *Nornorna* juĝoj. Ili estis diinoj de la tempo kaj de la sorto, kaj havis sian loĝejon apud la eterne verda frakseno *Yggdrasil*, kiu per siaj radikoj kaj branĉoj ĉirkaŭas la tutan mondon. Pri *Nornorna* oni kantas:

Ili leĝojn faris.
Ili vivojn difinis
Al la homoj,
Kaj de viroj sortojn ili antaŭdiris.

La plej eminenta el la dioj estis *Oden* ankaŭ nomita ĉiopatro aŭ patro de l' dioj kaj de l' homoj. Li estis ankaŭ plej saĝa el ĉiuj, kaj konis la sorton de ĉiuj. Du korvoj portis al li novaĵojn de la tuta mondo. Ofte li vojaĝadis tra la mondo por pliiĝi sian saĝegecon, li havis nur unu okulon kaj estis vestita per larĝa mantelo kaj granda ĉapelo. Li estis ankaŭ dio de milito. Kiam li iris al batalo, li sin armis per ponardego, kaj rajdis sur ĉevalo *Slejpner*, kiu havis ok piedojn. Li loĝis en la halo *Valhall*, kiu estis tiel granda, ke ĝi havis 540 pordegojn; ĉiu pordego estis tiel vasta, ke 800 batalantoj, unu apud la alia, povis ĝin trairi, kiam ili iris al batalo.

Al la batalo li sendis *Valkyrior* (junulinoj armitaj per ponardegoj), kiuj rajdis tra la aero, elektis la virojn, kiuj mortos dum la batalo, kaj reiris al *Valhall*. La batalantoj aŭ *Enharjarne* pasigis ravan vivon ĉe *Oden* en *Valhall*: tage ili amuziĝis per batalaj ludoj, kaj vespere trinkis *Mjöd*, kaj manĝis lardon de apro, kiu la vesperon estis buĉata, sed la sekvantan matenon ree estis vivanta. Kune kun *Oden* troviĝis dekdu aliaj dioj. *Tor* estis la plej forta kaj la plej potenca el ili, bonkora kiam li estis bonhumora, sed timiga kiam li koleris. Lia amuziĝo estis batali kun grandeguloj kaj diabloj, kiujn li frakasis per sia martelo *Mjölne*, kiu ĉiam trafis sian celon, kaj revenis poste propramove al lia mano. Kiam *Tor* iris al batalo sur sia batala ĉaro, tirata de du kaproj, tondris en la universo, kaj la martelo veturis kiel fulmofajro tra la nuboj; el tio formiĝis la fulmotondro.

Balder estis la plej bela el la dioj, kaj estis amata de ĉiuj; dio de la pieco, li estis tiel bona kaj pia, ke tio kvazaŭ radiis de li. *Njord* estis reĝo de la aero kaj de la vento, lia filo *Frej* regis pluvon kaj sunon, teran rikolton kaj homan feliĉon en la vivo. Lin oni alvokis pri paco kaj bonaj jaroj. Al *Frej* oni oferis dum la granda kristnaska festo en la Nordo, kiam la vintro komenciĝis. Ĉevalo estis oferata al li; sed en la kristnaska antaŭvespero oni oferis al li apron; sur ĝin oni metis la manon, kaj promesis fari glorajn kaj bonajn agojn, poste oni trinkis el la promesa



pokalo. La kristnaska apro kaj la ŝinko estas ankoraŭ daŭrigaĵoj de la antikva modo. *Brage* estis la dio de la poezio kaj de la elokventeco, *Hemdall* estis la gardostaranto de la dioj; li vidis senĉese de la ĉielarko (*Bafrast*), kiu kunligas ĉielon kaj teron; kiam li volis averti la diojn, li blovis en sia blovilo tiamaniere, ke tio aŭdiĝis en la tuta mondo.


La plej eminentaj el *Asynjorna* aŭ la diinoj estis *Frizg*, (edzino de *Oden*), *Fröja* kaj *Idun*. *Fröja* estis la diino de la amo, kaj al ŝi venis la virinoj post la morto; tie ankaŭ sin interrenkontis la geamantoj fidelaj unu al la alia ĝis la fino de la vivo. *Idun*, kiu estis edzino de *Brage*, konservis en skatolo la pomojn de la eterna juneco. Da ili manĝis la dioj, kiam ili maljuniĝis, kaj per tio ili rejuniĝis. Sed kiam foje la grandeguloj rabis ilin de *Idun*, la dioj fariĝis maljunaj kaj tre grizharaj.

En la komenco estis paco kaj feliĉo ĉe la dioj kaj la homoj, kaj la grandeguloj ne povis malutili al ili. Sed fine komenciĝis la malbono en la mondo de la dioj kaj de la homoj, kaj tion okazigis unu el la dioj mem. Li estis *Loke*, frato de *Oden*, naskita de grandegulaj gepatroj. Lia vizaĝo estis bona kaj bela, sed li estis malbona sente, kaj iniciatis nur malfeliĉojn. Li havis tri infanojn tiel same malbonajn kiel li mem, nome la tri monstroj *Fenresulfoen*, *Midgardsormen* kaj *Hel*. *Fenresulfoen* estis enkatenigata de la dioj, *Midgardsormen* ĵetata en la maron, kaj *Hel* fariĝis diino de la morto; ŝi regis la regnon, kien la malbonaj homoj venis post la morto. En la regno de



LOKE KAJ SIGYN.

Laŭ antikva skulpturo.



Neŭtrala Moresnet.

Unu el niaj tre distingindaj samideanoj, P^o Gustave Roy, el S^t Girons (Francujo) konigas en nova broŝuro (50 c. ĉe la Librairie de l' Esperanto), sagacan ideon pri fondo de sendependa esperantista ŝtato, utiligante la neŭtralan teritorion de Moresnet, kiu kuŝas inter Belgujo, Prusujo kaj Holandujo. La ideo estas tre atentinda kaj ni rekomendas la legadon de la broŝuro (france) al la franclingvaj samideanoj.

La ideo de S^{ro} G. Roy havis la bonegan rezultaton altiri la atenton de granda nombro da francaj ĵurnaloj *En l'Eclair* kaj *Le Petit Parisien*, ambaŭ tre gravaj, aperis ampleksaj artikoloj tiuokaze. Ni tre gratulas Sinjoron G. Roy pro la plano, kaj la lerteco laŭ kiu li ĝin utiligis por la propagando de Esperanto, kaj deziras ke la esperantistoj najbaraj je Moresnet alprenu kaj vigle subtenu la ideon. Tio ŝajnas esti necesega sukcesa kondiĉo.

A. M.

Hel estis nur malĝojo kaj ĉagreno, ĉar ŝia salono estis nomata *Armod* (malriĉeco), ŝia plado *Hnger* (malsato), ŝia tranĉilo *Svält* (malsatiĝo), kaj ŝia lito *Sjukdom* (malsaneco).

Dum *Balder* vivis, la dioj havis nenion por timi de la malbonaj grandeguloj. Sed fine la malica *Loke* sukcesis naski malfacilan malutilon. Li delogis la fraton de *Balder*, la blindan dion *Höd*, kaj kvazaŭ lude ĵetigis de li ponardegon sur *Balder*'on; la bona dio mortis, kaj nun la potenco de la dioj estas preskaŭ finita. Certe ricevis *Loke* justan punon. La dioj lin prenis, lin ligis kun ŝtonego kaj pendigis super li venenan serpenton; ĝi gutis sian venenon en lian vizaĝon, kaj tiam *Loke* tiris siajn katenojn tiel forte, ke la tuta tero tremis — tion oni nomis tertremo.

Sed *Loke* kaj la malbonaj potenculoj fariĝis fine liberaj kaj tiam okazis *Ragnarök* aŭ la pereado de la mondo. Tiam la

tuta naturo difektiĝis, la ĉielo krevis, kaj de *Muspelhem*, reĝo *Surt* venis ĉirkaŭata de flamoj. En *Vigrid* ebenaĵo okazis la fina batalo; tiam la bonaj kaj la malbonaj potenculoj mortigis unu la alian, kaj la maljuna mondo pereis.

Anstataŭ la pereigita mondo naskiĝas el la maro nova tero, ĉiam verda kaj bela, kaj ĉe ĝi vivos nova, pli feliĉa generacio; sed la malbonaj potenculoj estos forpelataj al *Niflhem*, kaj ili ricevos tie punon de siaj agoj. Tiam venos alia pli potenca dio, kies nomon neniu kuraĝas nomi, kaj li regos la novan mondon.

Esperantigita de

HJALMAR LINDSTEDT.

Korespondeto.

S^{ro} Alfred Petzold. Tre bonan ideon vi havis, sed tro malfrue rilate nian eliran daton.

S^{ro} Kühnl. — Dankon. — Mi sendis la monon al C. O.

Alfonso Allayo. La Oktobra N^o estis sendata al vi.

S^{ro} Schmid. Mi ne povas plenumi vian deziron.

S^{ro} Abramson. Mi ricevis la duan manuskripton. La unua tre baldaŭ enpresigis.

S^{ro} Charles S. Banks. La firmo Hachette ne transsendis al ni vian mendon. Sendu ĝin al ni senpere.

La adresŝanĝoj estas farataj nur laŭ peto akompanata de 50 centimoj.

Ni ne sendas senpagajn specimenojn.

Oni multe parolas pri supersignitaj literoj; ni rememorigas al niaj legantoj, ke la mondfama tipfandego Deberny havas provizaĵon da sufiĉe da karakteroj, por kontentigi la plej postulemajn. Niaj legantoj tion konigu laŭokaze.

La Faraono.

En la historio de ĉiuj civilizacioj oni trovas konkurojn, batalojn pli malpli akrajn inter la potencoj nereligiaj kaj religiaj. Jen la plej altaj estroj de la pastraro estas veraj militestroj, loĝantaj fortikaĵojn, batalantaj kiel militistoj kontraŭ la tiamaj landsinjoroj aŭ reĝoj, jen ŝirmitaj per la dikaj muroj de urbestroj loĝataj de armeo da pastroj, sed pli ankoraŭ per la timo al la dioj, zorge disvastigita kaj konservata de ili, ili regas la popolojn, kaj altrudas sian volon al la reĝoj kaj imperiestroj. Sub tiu lasta formo regis la pastrara potenco ĉe la aziaj popoloj, kie estas ankoraŭ videblaj admirindaj specimenoj de religiaj arkitekturoj, kaj en Egipto, kien transportas nin la Polo Prus en sia verko « La Faraono », kaj kun li nia bonkonata samideano Dr. Bein (Kabe), sen kies helpo la verko restus, por la plimulto el ni, kiel la trezoro de la Labirinto, ne ĝuebla.

Sed antaŭ ol raporti analizi la novan verkon (1), ni diru kelkajn vortojn pri la aŭtoro mem, malmulte konata, kiel lia verkaro, ekster Polujo (2).

Aleksander Glowacki, konata sub la pseŭdonimo Boleslaw Prus, apartenas kun Sienkiewicz kaj Zeromski al la trio de la plej famaj polaj romanistoj. Li naskiĝis en la jaro 1847, finis la kurson en la liceo de Lublin kaj poste studis la matematikon en « Varsovia Ĉefa Lernejo » (Varsovia Universitato).

Jen tio, kion skribas pri A. Glowacki lia lerneja kolego: « Li estas homo de boneco grandega, karaktero rekta, animo nobla, naturo sentema kaj poezieema, inteligenteco riĉa, koro plej pura. Lia idealo kaj celo — la bono kaj feliĉo de lia nacio. Li ne apartenas al iu partio aŭ grupo; ĉiu persekutata, suferanta, malfeliĉa haviĝas lian amon kaj certe lian helpon... ».

Prus komencis sian karieron (vivvojon) kiel ĵurnalisto, laborante en la gazeto *Kuriero de Varsovio* kaj baldaŭ akiris famon kaj popularecon per siaj « semajnaj kronikoj », en kiuj li kunigis talenton de sprita publikisto kun siaj karakterizaj kvalitoj: plej varma amo al sia patrujo, al ĉio alta kaj nobla.

« En tiu tempo oni ne povas prezenti al si Varsovon sen *Kuriero*, kaj *Kurieron* sen Prus », skribas unu kritikisto.

Du vortoj plene karakterizas la verkojn de Prus: la penso kaj la koro. Lia melankolia humoro rememorigas al ni la anglajn humoristojn Dickens kaj Thackeray. Kiel ĉe tiuj, ni trovas en la malgrandaj noveloj de Prus ridon tra larmoj, bonan observon, karikaturan priskribon de riĉuloj kaj altrunguloj, senliman amon en la pentrado de l' infanoj, mizeruloj, bestoj. Dum la lastaj dudek jaroj Prus ne skribis plu novelojn, sed romanojn — verkojn vere « grandajn », kiuj iam okupos honoran lokon en la panteono de la « Mondliteraturo » (nun ili estas preskaŭ nekonataj ekster Polujo).

La plej konataj estas « Pupo » (1891) — historio de homo, kiu mortigas sin pro malfeliĉa amo al pupo-virino; « La Posteno » — batalo de pola kamparano kontraŭ la germana koloniigo (temo ree aktuala); « Emancipulino » (1894) en kiu Prus prezentis tutan galerion el tipoj virinaj kun iliaj malbonaj ecoj, sed en kiu ankaŭ li trarigardis la virinan amemon ĝis ĝiaj profundoj kaj montras ĝian potencon da sento; fine « La Faraono » (1896) batalo de kreanta genio kontraŭ konservativa tradicio.

Tia estas, ja, la karakterizeco de tiu verko: tuj de la komenco ni vidas la religiajn aferojn kontraŭstarantajn al la heroo Ramzes, kiam, nomita *erpatre*, t. e. kronprinco, li direktas dum manovroj batalpretan armeon por meriti la estrecon de la korpuso Memfi: pro du skaraboj, sanktaj insektoj, rulantaj argilan buleton tra la vojo de la ŝoseo, sur kiu, laŭ ordono de la kronprinco, devas marŝi la armeo, tiu ĉi deflankiĝas tra intermonto laŭ decido de Sem-amen-Herhor, milita ministro, ĉefpastro de la plej granda templo de Amon en Teboj. Koleranta pro la temperdo, Ramzes forlasis la komandon al Herhor. Kaj tuj, parolante al Tutmozis, lia konfidato, li montras siajn sentojn kaj intencojn:

« Rigardu — ekkriis li al Tutmozis — tie devas esti mia tero, kaj ĉi tie mia armeo.... kaj tie plej altaj konstruaĵoj estas la palacoj de l' pastroj, kaj ĉi tie plej alta estro de la armeo estas pastro!... Ĉu oni povas toleri tion? »

— Se tia estas la volo de lia sankteco... — interrompis Tutmozis.

— Ne estas la volo de mia patro, ke la nomarĥoj regu despote en siaj ĉefurboj, kaj ke la etiopia vic-reĝo sin opinias egala al la

reĝo de l' reĝoj, kaj ne povas esti volo de mia patro, ke lia armeo ĉirkaŭiras du orajn skarabojn, tial ke la ministro de l' milito estas pastro.

Kaj kia estas la difinitiva rezultato de la regado de l' pastroj? La jena: mia praavo havis 100 mil talentojn da jara enspezo kaj 160 mil soldatojn, mia patro havas apenaŭ 50 mil talentojn kaj 120 mil soldatojn.

Kaj kia armeo!... Se ni ne havus la grekan korpuson, kiu tenas ilin en ordo, kiel la hundo la ŝafojn, jam hodiaŭ la egiptaj soldatoj obeus nur la pastrojn, kaj la faraono ne diferencus de simpla nomarĥo.

— De kie vi scias tion?... De kie venas tiaj pensoj? — miris Tutmozis.

— Ĉu mi ne devenas de la gento de l' pastroj! Ili ja instruis min, kiam mi ne estis ankoraŭ kronprinco. Ho! kiam mi fariĝis faraono, post mia patro, kiu vivu eterne, mi metos sur iliajn nukojn mian piedon en fera sandalo... Antaŭ ĉio mi etendos mian manon al iliaj trezorejoj, kiuj estis ĉiam plenaj, sed kiuj de l' tempo de Ramzes Granda komencis ŝveli kaj hodiaŭ estas tiel dikaj de oro, ke post ili oni ne vidas la trezorejon de l' faraono. »

Tiu linioj ebligas antaŭvidi la batalon — kiu, fakte, plenis la 3 volumojn, inter Ramzes ĝinta faraono kaj la pastrarestroj precipe Mefres kaj Herhor: la unua, kies malamo zorgas pri la Greko Likon mortiginto de la infano de Ramzes kaj de Sara, la dolĉa amatino, kaj mortiginto de Ramzes; kaj Herhor, kiu triumfas fine, surmetante sur sian kapon la tiaron de Amenhotep kun ureus.

Kiom simpatia sed iafaje senprudenta, pro troa malkaŝemeco, aperas Ramzes, forta kiel la bovo Apis, kuraĝa kiel leono kaj saĝa kiel la pastroj. Kiom alloga, la bedaŭrinda Hebreino, kies amo al Ramzes plenigas parton de la unua volumo per balzamumita bloveto. Kiom malvarmaj, iafaje kruelaj, ambiciemaj, ĵaluzemaj pri sia potenco, la plej altaj pastroj!

Konkuroj, intrigoj, bataloj, amoj, malamaj, mortigoj, triumfaj vojaĝoj kaj enterigaj procesioj naskiĝas, disvolviĝas, okazas en kadro ĉiam ŝanĝiĝanta, ĉiam interesa. Ĝi estas konstanta elvoko de la antikva Egipto tiom potenca, tiel riĉa per mirindaj arĥitekturaj, per skulpturaj, per strange grandiozaj, per monumentaj pentraĵoj. Kaj nenia detalo de la tiam viva tia, kia la plej lastaj fosadoj, deĉifroj de papirusoj kaj surmuraj enskriboj, ekzameno de tomboj aŭ templaj pentraĵoj ebligas ĝin imagi al si, estas flanklasita.

Tial, kiam iafaje la agado malrapidas, la atento tamen estas ĉiam vigligata per pleje interesaj detaloj.

Montrigas al ni la fonto de la Egipta riĉeĉo: leviĝoj kaj malleviĝoj de Nilo, anstataŭantaj la survojn per ŝipaj iradoj, utiligataj per digoj kaj kanaloj pripense desegnitaj kaj zorge konservataj por plej bona uzo de la fruktodoniga akvo; la laboro de l' kamparanoj, la vivo en la palacoj kaj tiu en la temploj, kun la trompoj, la artifikoj de l' pastroj, la filozofio de la egipta religio kaj de la mumigo, la kialo de la kulto al la bestoj; interesaj konsideroj pri la iama politika situacio de Egipto, la influo de la komercemaj Fenicianoj, bankieroj de Egipto kaj pro tio malamataj de la pastraro, kiu celas potenci la faraonon per riĉeĉoj senĉese amasigataj en la Labirinto, dum la enspezoj same malpligrandiĝas laŭ ĝia instigo.

Ĉio kio rilatas la morton de l' patro de Ramzes: preparo de la mumo, diversspecaj funebraj ceremonioj, lasta vojaĝo de l' mortinto sur Nilo, priskribo de la tombo faritaj, laŭ belaj laboroj de egiptologoj inter kiuj estas famaj la eltrovoj de Maspero, estas pleje interesa.

La enigma figuro de Sfinkso, komprenebla, ne estas forgesita; eĉ, laŭ tre bela penso, la aŭtoro elektis majestatan kadron de l' dezerto kun la piramidoj kaj Sfinkso, por anoncigi al Ramzes, ke lia patro mortis, kaj ke li estas nun « faraono, estro de l' mondo. »

Pri la dramo mem, estas neeble ĝin resumi en kelkaj linioj, sed ĝi estas premanta, kaj, kvankam ĉiuj simpatioj iras al Ramzes, oni ne povas sin deteni admiri la karakteran fortecon, kaj altan inteligentcon de Herhor, kiu reprezentas ĝis la fino la pastrara superan potencon.

Pri la valoro esperantista de la verko..., ĝi estas de Kabe: estas senutile pli multe diri.

A. MONTROSIER.

(1) Ĉe Hachette kaj Kio. Tri volumoj, 6 fr. Aŝranke 7 fr. 50 ĉe ni.

(2) Tiu biografieto estas verkita laŭ sciigoj afable senditaj de nia kunlaborantino S^{ino} Hulanicka, kaj de la tradukinto mem.

Kial li ne povas rigardi razilon.

Rakonto, originale verkita de J. SCHRÖDER, Wien (Aŭstrio) (1).

Silente ni sidadis, unu kontraŭ la alia, en la agrabla malgranda vintrinkejo, kiu estis la scenejo de nia revido post iro sur disiĝintaj vojoj, de longaj jaroj. Antaŭ ni, en delikate akritaj glasoj, briletis la bonodoraj oraj gutoj, per kiuj ni renovigis la malnovan amikecon.

Denove mi nevidate rigardis la vizaĝon kaj staturon de mia delonga kunulo Ernesto. Jes, oni ne povis ĝin nei: melankolia ombro malgajigis la mienon de la forta viro, kiu petole ridetis, kiam en la stacidomo tiam, ni fidelakore skuis la manon unu al la alia. « Adiaŭ kaj multe da feliĉo sur la vivo-vojo! » — Post tio la gaja kamarado malaperis el miaj okuloj kaj jam preskaŭ el mia memoro, ĝis hodiaŭ, kiam li surprizis min, frapante la pordon de mia fraŭla hejmo kaj invitis min, ke mi babiladu kun li la malmultajn horojn de lia halto en la ĉefurbo, apud botelo da nia iama vinospeco, en n'a kutima kunsidejo.

Plezurege mi kuniris. Sur la strato mi ne havis tempon por preciza rigardado; nun mi tion elplenumas.

La mieno de Ernesto jam ne estis tiel vivgaja kiel antaŭe. Eble ankaŭ tion kunhelpis la densa barbo, kiu kaŝis la malsupran duonon de l' vizaĝo en ombro malhela.

« Kial vi do lasis kreski tian hararegon ĉirkaŭ via mentono? Vi ja havis multe pli bonan elŝajnon portante nur la densajn lipharojn! » Certe mi povis pensi, ke mia amiko Ernesto estas pri tiu ĉi vira ornamajo tiel fiera kiel multe da viroj, al kiuj densega barbo estas donita de l' naturo.

« Razado kaj sinrazigado entute estas malagrabligita al mi, » rediris Ernesto, penseme forpuŝante la cindron de la cigaro, kaj malsekigante la lipojn per vino. Post tio li daŭrigis:

« Ĉu vi foje estis sapumita, sed ne razita, kaj tio en fervojvagono? »

« Sed kial solvigi enigmojn al vi » li interrompis sin; « mi preferas rakonti al vi tuj senhalte la tutan aferon, dum kiu mi de tre proksime vidis la okulojn de l' morto.

Antaŭ ĉirkaŭe unu jaro mi uzis la noktan rapidegvagonaron de London' Dover'on — vi scias, ke la kampo de mia laborado fariĝis Anglujo — por veturi sur matena vaporboato Calais' on, kaj de tie iri Paris' on, kie mi estis plenumonta interkonsenton pri metia afero. Mi oportunigis al mi por la nokto la kupeon, en kiu mi estis tute sola, kaj kuntirinte la fenestrokurtenojn, malheliginte la lumigilon, mi ĵus estis kuŝiĝonta agrable sur la sidejo, kiam, en la momento de la ekveturo, la pordo estas malfermata, kaj tre alta persono kun mankofero en la maldekstra mano enpaŝas mian kupeon.

La veninto salutis ĝentile, post tio li ĉirkaŭrigardis pro sidejo, kaj deponis sian pakajon. Li sidiĝis kontraŭ mi, kaj liaj okuloj, kiuj kvazaŭ bruis, persiste fiksadis min.

Post malmultaj momentoj li ekstarigis, serĉadis kelkan tempon en la kofro, kiun li estis malsupren-

iginta el la reto, kaj denove alproksimiĝis al mi. Kiam li staris antaŭ mi, en lia maldekstra mano mi ekvidis sapujon, kiu apartenis al razilaro, kaj sapumpenikon. Dum mia kunvojaĝanto diligente agitis la penikon en la sapujo, tiel ke la ŝaŭmero ĝsprucis ĉirkaŭen sur la kusenojn, li diris ĝentile:

« Bedaŭrinde vi forgesis razigi vin antaŭ la vojaĝo. Tial permesu, ke mi liberigu vin de via barbo.

« Sed, sinjoro, kion vi pensas », mi estis dironta mirigite, sed li ne lasis tempon al mi, por interrompi lin, kaj daŭrigis:

« Eksciu, ke estas mia pasio — tute ne mia metio — razi miajn kunvivulojn lerte, rapide kaj sendolore. Mia fratino ĉiam ĝojas kiel infano atendante la momenton, kiam ŝi venos sub mian razilon, kaj la principo de... li eksilentigis, pripensis unu momenton kaj daŭrigis paroli, plu ne serĉante la nomon, pri kiu li certe ne memoris, — danke skuas mian manon, post kiam mi razis lin kaj diras: Jes, tiel bone neniu povas razi kiel sinjoro Hopkins. — « Mi petas vin, ĉirkaŭi vian kolon per tiu ĉi tuko, kaj apogu vin oportune ».

Estis klare por mi, ke mi havas frenezulon antaŭ mi. La pika rigardo kaj la stranga parolo sufiĉe malkaŝis al mi, ke sinjoro Hopkins' ne estas mastro de sia prudento. Ekkonsciinte tion, mi per rapida rigardo serĉis eliran vojon, sed nenian mi vidis antaŭ mi. La trajno kuradis antaŭen kun egala rapideco, kaj ne estis eble por mi haltigi ĝin, ĉar mia kunulo tiel altrudis sin, ke la vojo ĝis la haltigilo prodanĝera estis barata al mi. Nun li eĉ tenis jam en la dekstra mano sian brilantan razilon!

« Rigardu nur ĉi tiun ŝtalon; certe vi konas la firmomarkon! » Instinkte mi ĝin prenis de li: « permesu, ke mi ekzameni ĝin pli precize », mi diris kun subita ĉeesto de spirito, sed ĝi jam estis malaperinta el la ĉirkaŭo de miaj manoj.

« Ne, tio ne taŭgas por vi! Efektive vi difektus ĝin! Lasu ĝin kaj restu trankvile, por ke mi bone povu sapumi vin ».

Ĉia kontraŭstaro kontraŭ la frenezulo en tiu momento estis sencela. Mi komprenis, ke estos pli saĝe akcepti la intencon de la frenezulo, kaj provizore resti trankvila.

Laŭmetie li manuzis la penikon, ĝis sufiĉe dika krusto de sapŝaŭmo kovris miajn vangojn. Post tio li delikate akritis la razilon per poŝa manrimeno, ne deturnante siajn okulojn de mi eĉ unu momenton, kaj nun li, rikanante, alpaŝas tute proksime al mi.

« Jen vi nun estas bele neĝblanka; nun mi ekbuĉu, li kriis. Tio tute ne doloras, nur tiklas je la kolo, kiam oni movas ĝin; vidu, tiel kaj tiel... ».

Kun okuloj vaste malfermitaj mi rigardis mian kontraŭulon, aŭdinte liajn frenezajn parolojn. Rapide mi pripensis, kion mi povus fari por forturni de mi la minacantan mortodanĝeron; sed miaj brakoj kvazaŭ lanaj pendis, miaj kruroj estis rigidaj kvazaŭ dormantaj, kaj eĉ la kapon mi ne povis movi sub la brula rigardo de la frenezulo. Kvazaŭ senviva mi ree falis sur la kusenojn.

Sed en sama momento, kiam la cerbmalsanulo

(1) La aŭtoro publikigis germanlingvan tradukaĵon en la germana gazetararo sub sia pseŭdonomo « Nolger ».

metis la razilon al sia propra gorĝo, por fari al mi mian morton tre okulvidebla, la vagono forte ekpuŝis. La haltigilo grincante alkuŝiĝis al la radoj, mia premeĝulo ŝanceliĝis, la razilo profunde eniris en lian gorĝon, kaj kun gargara sono li falis sur min.

La teruron, kiu ekprenis min, mi ne povas priskribi al vi. Kiam mi sentis la korpon kuŝantan sur mi, konvulsie mi ĉirkaŭkrampis ĝin per ambaŭ brakoj, kaj faligis min kun ĝi antaŭen sur la kontraŭan sidejon. Sed mi jam nenion devis timi. Similaj al vitro fikse min rigardis la okuloj de la viro, en kies manoj, antaŭ kelkaj sekundoj, mia vivo ŝajnis esti tenata. El la disstaranta gorĝovundo fluegis sangrivero, kaj la razilo falis el la mano de l' mortinto sur la plankon.

Mi estis pli malviva ol viva. Krom tio mi certe prezentis, sangmakulita kaj kun sapumita vizaĝo, teruregan vidigon. Kiam mi vidis, ke la frenezulo jam



Desegn. de Al. Kress.

... MI HAVAS FRENEZULON ANTAŬ MI.

Sed baldaŭ oni sciigis, ke sinjoro Hopkins' efektive estis forkurinta al la frenezulejo Bedlam'. Kiamaniere li estis akirinta la razilon, tio restis neklarigita.

De tiam mi povas nek rigardi, nek manuzi razilon.»

JOS. SCHROEDER.

ne estas savota, mi kuregis al la haltigilo prodanĝera kaj post malmultaj momentoj mi estis ĉirkaŭita de homoj, kiuj fiksadis min kaj kriegis.

La sola fakto, ke mi mem estis doninta la signalon pri danĝero kaj neniel forkuris, plie, ke mi, plenerkonsciiginte, senĉese rakontis la teruregan okazintaĵon sen eksilento kaj sen kontraŭdiro, savis min de arestigo. Unuamomente ĉiuj kompreneble supozis, ke mi estas la mortiginto de mia kunvojaĝanto, kiu sternite rigide kaj fikse kuŝis kun tranĉita gorĝo sur la planko de l' vagono.

Cetere sekvis juĝista aŭskultado, kaj mia vojaĝo Paris' on tiam fariĝis neebila.

ĈIULANDAJ KUTIMOJ. LA KANDELFESTO.

La Kandelfesto! Beleta nomo, kiu revenigas en la penson la memoron pri la antikvaj procesioj kaj la kandellegoj, kiuj brilis en la manoj de l' fidelaj kristanoj.

Kiel multaj aliaj malnovaj festoj, la Kandelfesto estas nur kristana arango de idolana festo, kaj la kamparano, kiu kirlas sian faron por el ĝi fari patkukojn, certe ne konjektas, ke same kiel tiu aŭ alia anonima prapatro de l' plej antikvaj tempoj, li plenumas oferdonon al Cereso (1).

La tradicio de la Kandelfesto, kiu en la pasintaj jaroj estis senlabora festotago, iom post iom malaperis en la urboj, krom eble en Bretagne, kaj de ĝi restas nur la prezentado de l' tute junaj infanoj en la preĝejo dum la tago de la Purigado.

En Italujo, Hispanujo, Portugalujo, ĝi ĉiam okazigas grandan feston.

Ĉiokaze, en niaj kamparoj, la Kandelfesto restas granda terkultura festo koincidanta kun la rekomenciĝo de l' kulturaj laboroj, kaj, ĉirkaŭ la 2^a de februaro, preskaŭ ĉie okazas grava foiro.

Estas ankaŭ tre multaj proverboj kaj diraĵoj — el kiuj kelkaj estas tre malnovaj — rilatantaj al la terkultura graveco de l' Kandelfesto.

El ĉiuj kutimoj de la Kandelfesto, kiu pli bone kontraŭbatalis la indiferentecon de l' tempo, tiu estas la farado de l' patkukoj. Antaŭ ne tre longe ankoraŭ, ĉe la kamparo, ĉiu farmo, en kiu oni ne faris patkukojn, aŭ en kiu ilin oni ne sukcese faris, estis fatale vidonta la grenon kariĝantan en la kampoj tuj post la alveno de l' somero.

Eĉ en la urboj oni faras ankoraŭ patkukojn en la patriarkaj familioj. Kiu korekte turnas sian kukon, kaj ĝin jetas supren per firma mano, por poste ĝin lerte ricevi en la varman paton, tiu povas konfidi, ke ĝi la tutan jaron havos feliĉon; sed la mallertulo, kiu ĝin lasas fali sur la fornon kiel malĝojigan

ĉifitan tukon, povas antaŭvidi ĉiujn humiligajojn de l' sorto ĝis la revengo de la sekvonta Kandelfesto.

Ĉiu scias la malfeliĉajn okazintajn al Napoleono ĉe la Kandelfesto de la 1812^a jaro. La imperiestro estis irinta ĉe « Malmaison » on pasigi apud imperiestrino Josefino unu el tiuj momentoj, en kies daŭro la du ekszedzigitaj geedzoj sentis ankoraŭ ian ĝojon.

Oni faris patkukojn, ĉar Napoleono, superstiĉa kiel ĉiuj grandaj kubludantoj antaŭ la Eternulo, kredis al la antaŭsignoj de l' patkukoj; tian kredon li estis akirinta en Korsujo, kien ĝi estis veninta el Italujo. Unu, du, tri patkukoj sukcesfaritaj! Tio antaŭsignis, ke li tiel multajn batalojn gajnos dum tiu Rusuja milito, kiun li finis prepari. Sed, ho ve! la kvara plorinde falas sur la ruĝigitan ladon, kaj tie karbiĝis. Kiu scias, ĉu antaŭ la fajrego de Moskvo, Napoleono nevole ne pensis pri la karbiĝinta patkuko de l' Kandelfesto?

Tre beletan legendon oni rakontas ankoraŭ dum la noktkunvenoj en la vilaĝoj ĉe l' bordoj de la riverego Rhône aŭ de l' Gaskonja sudo — cetere, bone serĉante, oni ĝin trovas ĉie kaj ĝis en la insulo de Francujo —; ĝi estas la legendo pri la fianĉigo de l' birdoj ĉe la Kandelfesto. Iru sur la kamparon, la 2^{an} de februaro, kaj se vi ne estas tiel blinda kiel naturisto aŭ ano de l' Instituto, vi certe vidos birdarojn pasantajn kaj repasantajn, sin interevitantajn, sin reciproke serĉantajn, vokantajn unuj la aliajn, ĝojege pepantajn. Tio estas flugila kaj pepata amuziĝo, kiu daŭras ĝis la vesperkrepusko. Sed tuj post la krepusko, oni silente forigas duope por la nestigo de l' fianĉiĝoj. Tamen se malŝancelo ne trovis la prirevitan birdon, li facile konsoligas, kaj sentime fianĉigas en la unua nesto renkontata. Triopa nesto! Pri tio konsentas... la birdaro; kaj pri tio almenaŭ naturisto, eĉ se li estas Institutano, ne diros ne.

Laŭ le « Petit Méridional »
Esperantigis JOHANINO FLOURENS.
H. M. de E. V. K.

(1) Diino de la terkulturado.

La Fratoj de Mowgli.

Verkita de la famega angla aŭtoro RUDYARD KIPLING.

Eble Shere Khan estus povinta kontraŭstari Patron Lupon, sed ne Patrino Lupinon, ĉar li scias, ke pro la loko, kie ili staras, ŝi estas tute favorata kaj batalus ĝis la morto. Tial li elteris sin el la kavernbuŝo, murmurante; kaj kiam li estis ekstere, tiam li blekegis:

« Ĉiu hundo blekas en sia propra korto! Ni vidos tion, kion la Aro diros pri tiu ĉi nutro de homidoj. La ido estas la mia, kaj al miaj dentoj li fine venos, ho dikvostaj ŝtelistoj! »

Patrino Lupino spiregante sin ĵetis teren inter la idoj, kaj Patro Lupo diris al ŝi serioze:

« Tion da vero diras Shere Khan. La homido devos esti montrata al la Aro. Ĉu vi ankoraŭ gardos lin? »

« Gardos lin! » ŝi ripetis, « li venis nuda, nokte, sola kaj tre malsata; malgraŭ ĉio, li nenion timis. Rigardu, jam li forpuŝis flanken unu el miaj idoj. Kaj tiu lama buĉisto lin estus mortiginta, kaj poste estus forkurinta al la Waingunga, dum la ĉi tieaj vilaĝanoj ĉasus tra niaj kuŝejoj por venĝo! Gardos lin? Certege mi gardos lin! Kuŝu kviete, raneto. Ho vi Mowgli — ĉar Mowgli, la Rano, mi nomos vin — la tempo alvenos, kiam vi ĉasos Shere Khan'on, kiel li ĉasis vin. »

« Sed kion diros nia Aro? » diris Patro Lupo.

La Leĝo de la Ĵunglo diras tre klare, ke ia Lupo, kiam li edziĝas, povas forigi sin de la Aro, al kiu li apartenas; sed, tuj kiam liaj idoj povas stari surpiede, li devas alporti ilin al la Lupara Konsiliĝo, kiu ordinare okazas ĉiumonate je la plenluno, por ke la aliaj lupoj povu identigi ilin. Post tiu ekzameno, la idoj estas liberaj, kiu kien ajn plaĉas al ili; kaj ĝis ili estos mortigintaj sian unuan cervon, nenia senkulpiĝo estas akceptota, se plenkreska lupo de la Aro mortigis unu el ili. La puno estas la morto, se la mortiginto povas esti trovata; kaj se vi pripensos unu minuton, vi vidos, ke tiel devas esti.

Patro Lupo atendis ĝis liaj idoj povas iomete kuri, kaj tiam en la nokto de la kunveno de la Luparo, kondukis ilin, kaj Mowgli'on kaj Patrino Lupinon, al la Konsiliĝa Ŝtonego, montsupraĵo kovrita de ŝtonoj kaj ŝtonegoj, inter kiuj centoj da lupoj povus kaŝi sin. Akela, la granda griza Sol-Lupo, kiu estis Estro pro sia forteco kaj ruzeco, kuŝis etendite sur sia ŝtonego; kaj malsupre sidis dekkvar aŭ pli da lupoj, el ĉiuj gradoj de grandeco kaj koloro, de mel-grizaj maljunuloj, kiuj povus solaj mortigi cervon, al nigraj trijaraj junuloj, kiuj pensas, ke ili povas fari tion. La Sol-Lupo estis reginta la luparon dum unu jaro nun. Dufoje li falis en kaptilon, kaj unufoje li estis batita, ĝis oni pensis ke li estas mortigita; tial li bone scias la manierojn kaj kutimojn de la homoj. Estis tre malmulte da interparoladoj ĉe la Konsiliĝo. La idoj, en la mezo de la rondo, kie sidis la gepatroj, lude renverŝis unuj la aliajn, kaj jen unu, jen alia el la pli malnovaj lupoj, kviete aliris al ido, zorge rigardadis ĝin, kaj tiam reiris sian sidejon senbrue. Kelkafoje patrino puŝis sian idon

rekte sub la lunradiojn, por ke ĝi ne estu forgesita.

De sia ŝtonego, Akela kriis: « Ci scias la Leĝon, ci scias la Leĝon. Rigardu bone, ho Lupoj! » kaj la maltrankvilaj patrinaj ripetis: « Rigardu, rigardu bone, ho Lupoj! »

Fine — kaj Patrino Lupino rektigas siajn kolhar-egojn — Patro Lupo puŝis Mowgli'on, la Ranon, kiel ili nomis lin, en la mezon de la rondo, kie li sidis ranta, kaj ludanta kun kelkaj ŝtonegoj, kiuj brilis sub la lunlumo.

Akela neniel levis sian kapon, sed daŭrigis la unutonan blekon: « Rigardu bone! » Raŭka blekego sonis de post la ŝtonego — la voĉo de Shere Khan, krianta « La ido estas la mia. Donu lin al mi. Kion faras la Libera Popolo kun homido? » Akela neniel ekmovis sian oreton; li nur diris: « Rigardu bone, ho Lupoj! Kion faras la Libera Popolo pri la ordonoj de iu, krom la Libera Popolo. Rigardu bone! »

Estis horo de koleretaj blekoj, kaj juna lupo, nur kvarjara, moke ripetis la demandon de Shere Khan al Akela: « Kion faras la Libera Popolo kun ido de homo? » Nun, la Leĝo de la Ĵunglo ordonas, ke se estas ia disputado pri la rajtoj de ia lupido, aŭ pri ĝia akcepto de la Aro, almenaŭ du membroj de la Aro, kiuj ne estas ĝiaj gepatroj, devas paroli favore por ĝi.

« Kiu parolas por tiu ĉi ido? » demandis Akela. « Inter la Libera Popolo, kiu parolas? » Estis nenia respondo, kaj Patrino Lupino sin pretigis por la batalo, kiu, ŝi tion sciis, estus ŝia lasta, se okazus batalado.

Tiam, la sola alia estaĵo, kiu estas permesita ĉeesti la Ar-konsiliĝan Kunsidon, Baloo, la dormema bruna urso, kiu instruas la lupidojn pri la Leĝo de la Ĵunglo; la maljuna Baloo — kiu povas veni kaj iri tien ajn, kien plaĉas al li, ĉar li manĝas nur nuksojn, radikojn kaj mielon — tiam Baloo sidiĝis sur sia postajo, kaj diris:

« La homido — la homido? » li diris. « Mi parolas por la homido. Ne estas ia malbono en homido. Mi ne posedas la kapablon lertparoli, sed mi diras la veron. Li kuru kun la Aro, kaj li estu akceptita kun la aliaj. Mi mem instruos lin. »

« Mi bezonas ankoraŭ unun plie, » diris Akela. « Baloo estas ĵus parolinta, kaj li estas nia instruisto por la lupidoj. Kiu parolas krom Baloo? »

Nigra ombro falis sur la rondon. Estis Bagheera, la Nigra Pantero, tute inke nigra. Ĉiu konis Bagheera'on, kaj neniu deziris ofendi lin, ĉar li estas, tiel ruza kiel Tabaki, tiel kuraĝa kiel la sovaĝa bubalo, kaj tiel sentimegema kiel la vundita elefanto. Sed li havas voĉon tiel dolĉan, kiel sovaĝ-mielo falanta de arbo, kaj haŭton pli molan ol lanugo.

« Ho Akela, kaj vi, la Libera Popolo, » li dolĉe diris, « mi ne havas la rajton, ĉeesti vian kunvenon; sed la Leĝo de la Ĵunglo diras, ke se estas ia dubo rilate al nova ido, kiu ne estas morta afero, la vivo

(1) Sekvo. Vidu la Januaran numeron. Tiu traduko estas verkita kaj publikigata kun la aŭtoro permeso de la aŭtoro, kaj de la eldonistoj Sreĵ Macmillan kaj K^o, London.

de tiu ido povas esti aĉetata por ia prezo. Kaj la Leĝo ne diras tiun, al kiu estas, aŭ ne estas permesate, pagi tiun prezon. Ĉu mi estas prava? »

« Bone! Bone! » diris la junaj lupoj, kiuj ĉiam estas malsataj. « Aŭskultu Bagheera' on. La ido povas esti aĉetata por ia prezo. Tiel estas la Leĝo. »

« Sciante, ke mi ne havas la rajton paroladi tie ĉi, mi petas de vi la permeson. »

« Parolu do », kriis dudek voĉoj.

« Mortigi nudan idon estas hontinda. Plie, li eble faros pli bonan sport' on por vi, kiam li estos plenkreska. Baloo parolis por li. Nun al la vorto de Baloo mi aldonos unu bovviron, grasan, nove mortigitan, kiu kuŝas je duono da mejlo de tie ĉi, se vi akceptos la homidon laŭ la Leĝo. Ĉu tio estas malfacila? »

Estis bruego de voĉoj dirantaj: « Estas negrave. Li mortos pro la vintraj pluvegoj. Li ekbrulos pro la suno. Kian malbonaĵon nuda rano povos fari al ni? Li kuru kun la Aro. Kie estas la bovviro, Bagheera? Li estu akceptita. »

Kaj tiam sonis la profunda blekego de Akela, krianta: « Rigardu bone, rigardu bone, ho Lupoj! »

Mowgli estis ankoraŭ treege interesata de la ŝtonetoj, kaj li estis tute indiferenta, kiam la lupoj venis kaj rigardadis lin, unu post alia. Fine ili ĉiuj malsupreniris la monteton, por trovi la mortigitan bovviron, kaj nur Akela, Bagheera, Baloo, kaj la propraj lupoj de Mowgli restadis. Shere Khan blekegis ankoraŭ en la nokto, ĉar li estis treege kolera, tial ke Mowgli ne estas donita al li.

« Ha, bone blekegu! » diris Bagheera, « venos la tempo, kiam tiu ĉi nudajo igos cin blekegi alian agordon, aŭ nenion mi scias pri homo. »

« Tio estas bone farita », diris Akela, « homoj kaj iliaj idoj estas tre saĝaj. Eble li estonte estos helpo al ni. »

« Vere, helpo en la tempo de bezono; ĉar neniu povas esperi konduki la Aron por ĉiam, » respondis Bagheera.

Akela nenion diris. Li pensis pri la tempo, kiu alvenas por ĉiu Estro de ĉiu Aro, kiam li perdos sian fortecon, kaj igos pli kaj pli malforta, ĝis fine li estos mortigita de la lupoj, kaj nova Estro reĝos, kaj estos mortigata siavice.

« Forprenu lin, » li diris al Patro Lupo, « kaj instruu lin, kiel taŭgas ĉe Libera Popolo. »

Kaj jen kiel Mowgli estis akceptita de la « Seeonce » Luparo, por la prezo de bovviro kaj la bona vorto de Baloo.

Nun vi devas esti kontentaj preterlasi dek aŭ dekunu jarojn, kaj nur diveni la mirindan vivon de Mowgli inter la lupoj, ĉar se ĝi estus priskribita, ĝi plenigus multajn librojn. Li kreskis kun la lupidoj, kvankam ili kompreneble estis preskaŭ plenkreskaj lupoj, antaŭ ol li estis knabo; kaj Patro Lupo instruis lin pri la signifo de ĉio en la ĵunglo, tiamaniere ke ĉiu brueto en la herbaro, ĉiu spireto de la varma nokta aero, ĉiu noto de la gufo supre de lia kapo, ĉiu grato de ungoj de vesperto, dum ĝi restas sur arbo, kaj ĉiu salto de ĉiu fiŝeto en marĉlageto; signifis al li ĝuste tiel multe, kiel la taglaborado de oficejo signifas al negocisto.

Kiam li ne estis lernanta, li sidis sub la suno kaj

dormis, kaj manĝis, kaj redormis; kiam li sentis sin malpura, aŭ varmega, li naĝis en la arbaraj lagetoj; kaj kiam li deziris mielon (al li diris Baloo, ke mielo kaj nuksoj estas ĝuste tiel plaĉaj, kiel nekuirita viando) li suprenrampis por ĝi, kaj Bagheera montris al li, kiel tion fari.

Bagheera kuŝiĝis sur branĉo kaj vokis: « Venu, Frateto », kaj unue Mowgli sin tenegis al la arbo, simile al besto, kiun ni nomas « La Mallaboremulo » (1), sed poste li iris tra la branĉoj preskaŭ tiel kuraĝe, kiel la griza simio.

Li ankaŭ prenis sian lokon ĉe la Konsiliĝa ŝtonego tiam, kiam la Aro kunsidis, kaj tie li eltrovis, ke se li tre fikse rigardadas ian lupon, tiu lupo estas devigata mallevi siajn okulojn, tial li rigardadis por la ŝerco. Alifoje li eltiris la longajn dornojn el la felo de siaj amikoj, ĉar lupoj terure suferas de dornoj en sia felo. Li malsupreniris la montflankon al la kulturaj landoj nokte, kaj tre scivole rigardis la vilaĝanojn en iliaj dometoj, sed li multe malkonfidis je homoj, ĉar Bagheera montris al li kvadratan skatolon (kaptilon) kun falpordo, kiu estis tiel ruze ŝirmita en la ĵunglo, ke preskaŭ li enmarŝis en ĝin. Pli forte ol ĉio, li ŝategis kuniri kun Bagheera en la malluma arbarego por dormi dum la tago, kaj nokte vidi, kiel Bagheera faras mortigon.

Bagheera mortigis jen tie ĉi, jen tie, kiam ajn li sentis sin malsata. Same Mowgli — krom unu escepto. Tio frue, kiom li povis kompreni tion, Bagheera diris al li, ke neniam li devas tuŝi brutojn, ĉar li estas aĉetita de la Aro por la prezo de la vivo de bovviro. « La tuta ĵunglo estas la cia », diris Bagheera « kaj ci povas mortigi ĉion, kion ci estas sufiĉe forta por mortigi; sed pro la bovviro, kiu aĉetis cin, neniam ci devas mortigi aŭ manĝi ian bruton, junan aŭ maljunan. Tio estas la Leĝo de la ĵunglo ». Mowgli fidele obeis.

Li kreskis, kaj kreskis forte, kiel devas kreski knabo, kiu ne scias, ke li lernas lecionojn, kaj kiu ne bezonas, zorgi pri io krom manĝaĵo.

Unu aŭ dufoje Patrino Lupino diris al li, ke Shere Khan ne estas konfidinda, kaj ke ian tagon li devos mortigi Shere Khan' on; sed kvankam juna lupo estus memorinta tiun konsilon ĉiuhore, Mowgli forgesis ĝin, ĉar li estas nur knabo — kvankam li estus nominta sin lupo, se li estus povinta paroli homlingve.

Shere Khan ĉiam estis jen tie, jen ĉi tie en la ĵunglo, ĉar ju pli Akela maljuniĝis, des pli la lama tigo tre amikiĝis kun la pli junaj lupoj de la Aro, kiuj sekvis lin por manĝrestaĵoj, afero kiun Akela neniam estus permesinta, se li estus kuraĝinta puŝi sian aŭtoritaton al la severaj limoj. Tiam Shere Khan flatis ilin, kaj miris, tial ke tiel belegaj junaj ĉasistoj kontente permesas, ke mortanta lupo kaj ido de homo ilin regu. « Oni diris al mi, ke, ĉe Konsiliĝa kunsido, vi ne kuraĝas rigardi lin inter la okuloj », diris Shere Khan, kaj la junaj lupoj blekis kaj koleris.


C. W. OXENFORD,

Prezidantino de « E. Vagabonda Klubo »,

Dairigota.

Anglujo.

(1) La zoologia nomo de la besto estas « *Choloepus diductylus* ».



FACETADO KAJ POLURADO DE L' DIAMANTOJ.

Diamantoj kaj Diamantistoj.

Plendo pro trompŝtelo, farita de Sinjoro Werner, direktoro de la fama diamanta kompanio DE BEERS, kontraŭ ia Sinjoro Lemoine, kiu vendis alpreze pretendatan sekreton por la fabrikado de diamantoj, aliras la atenton pri tiuj valoraj ŝtonetoj. Spertizisto kaj diamantfacetisto, Sinjoro de Haan, estus rekoninta ŝtonetojn ekklivitajn de li, inter kvazaŭ fabrikitaj de Lemoine. Ŝajnas do, ke tiu estas vere trompisto, tiom pli ke franco Moissan, kies eksperimentoj tiel famiĝis, sukcesis nur fabrikadi diamantpulvoron.

Kio ajn estas, ni pensas interesi niajn gelegantojn, enpresante artikolon pri tiu aktualeca temo.



Se malmultaj esperantistoj posedas, ho ve, diamantaran ornamajon, kontraŭe preskaŭ ĉiuj iafoje tenis en mano unu, sian aŭ de aliaj, el tiuj flambriklantaj ŝtonetoj, fierigaĵo de l'koketularo kaj altraugularo, ornamajo de l'reĝaj aŭ imperiestraj diademoj, kies valoro de unu eble valoras riĉecon: ĝi estas « *Diamanto* », plej bela kaj ŝatinda el ĉiuj multekostaj ŝtonoj. Sed kiom da samideanoj konas la manieron tranĉadi, facetaradi kaj poluradi ilin? Tion ni penos klarigi al la legantaro de nia « *Tra la Mondo* », prave nominda « *Pri-ĉio-Informanto* »!

La diamantoj estas speciala siliko malmolega, preskaŭ nerompebla; ili estas trovataj en malmultaj montaj lokoj el Suda Afriko, precipe en la angla kolonio « *Cape* », en *Hindujo* kaj *Brazilujo*. Je kruda stato, ili apenaŭ estas diferencigeblaj je l' ceteraj komunaj ŝtonetoj. Ilia ekstraktistaro konsistas nur el negroj, pro ambaŭ kaŭzoj ke ilia manlaborado estas malpli kara ol tiu de blankuloj, kaj precipe ĉar oni supozas ilin malpli sciantaj pri la valoro de tiaj trovaĵoj. Oficistoj observadas ilin, ĉiam pretaj redonigi plej maldikan valorŝtoneton, ĉu rapidege kaŝitan en vestan faldon, ĉu eĉ subite englutitan en ies buŝon. En tiu lasta okazo, vomilo aŭ laksilo tuj plenumas la rolon de « *Redonigisto* », antaŭulo de severa puno.

Ĉiuj diamantlaborejoj kuŝas en Antverpeno, Amsterdamo, Genevo, Saint-Claude (Sankta Klaŭdo, en Francuja Jura'a regiono), Parizo kaj en ilia ĉirkaŭaĵo. La Holandanoj havas la monopolon de l' unua laborparto nomata « *Clivage* (Klivaĵo) ». Ĝi konsistas fendi la ŝtonetojn laŭ ilia formo, oferante la malbonajn partojn, kiuj pulvorigitaj estas nomataj holande « *Boord* », france: *égrisé*, kaj uzataj kiel dirote ĉi sube.

La dua laborparto estas nomata « *Brutage* » (brutaĵo); ĝi estas severa preparo de la diamantoj: ilin fiksinte sur specialan aparaton, la laboristo frotas du diamantojn reciproke, ĉar diamanto estas eluzebla nur per si mem, formas regulan rondon meze de l' estonta juvelo, pintigas ĝian malsupron kaj rondigas la supran parton. Tiu laboro, kiu unuavide ŝajnas tre simpla kaj facila, estas kontraŭe tre delikata, kaj postulas sperton de la preparisto: efektive, li devas antaŭvidi por doni formon al la ŝtonoj, deprenante de ili kiel eble plej malmulton el la formata materio: duobla profito ĉu por la laboristo, kiu tiam ne bezonos eluzi tiom el ĝi, ĉu por lia mastro kiu havos pli dikan vendotan diamanton, kio estas grava pro la valoro de tiu komercaĵo.

Nun ni priskribu l' aparaton « *diamantportilo* »: ĝi estas preskaŭ sama por la ĵus parolita laborparto kiel por la poste priskribota: ĝi konsistas el fandfera konko, kava kun trunketo el mola fero; en tiun konkon enfluidiĝas plumbo elstaranta duone kaj konusforme super la konka rando. Per lampa flamo la diamantisto moligas la pintan supran parton de tiu plumbaĵo, kaj en ĝin internigas duone la laborotan diamanton, lasante malŝirmita la preparotan aŭ polurotan flankon.

Tiu laborparto estas nomata « *Lutado* ». Ĝi estas iom doloriga, ĉar la varma metalo brulvundas kruele la fingrajn pintojn de la lutisto. Kiam la ŝtono ne estas plu atingebla ĉe la malkaŝita parto, oni ŝanĝas ĝian pozicion laŭbezzone. Nun ni parolu pri la lasta laborparto, la plej daŭra kaj grava, kiu estas montrata per la vidaĵo: ĝi estas « *Facetado* » aŭ « *Polurado* ». Antaŭe, diamanto havas ian formon, sed ne « *fajrojn* »: ĝi estas malhela kaj senfaceta; la demando estas fari sur ŝtoneto, dika kiel pingla kapo, de 16 ĝis 32 facetoj, regulaj kiel damtabulaj kvadratoj! Por tio la poluristo posedas nur la « *konkon* », pendigileton por ĝin teni, kaj platan « *Muelilon* », tian kian oni povas vidi pendantan antaŭ ĉiuj poluristoj sur la bildo. Ĝi estas ronda plataĵo el superkvalita ferfandaĵo, laŭlarĝe signita de streketoj proksimegaj unuj de l' aliaj. Tiu rado turniĝas rapidege laŭ la horizonta direkto, per meĥanika motoro kaj ĝia dentetaro, helpita de l' diamanta pulvoro « *boord* » aŭ « *égrisé* » (tial ke diamanto estas eluzebla nur per si mem) kiu eniĝas la radan kavajetaron, eluzas iom post iom la kvar aŭ ses ŝtonojn tenatajn sur la « *muelilo* ». Komprenoble ĉiuj diamantoj ne estas facetblaj samfacilece, kio devigas zorgi pri

ili laŭvice. Laŭ tio, oni komprenas ke tiu laborado ne estas peniga korpe, sed okule. Por esti lerta, diamantisto devas havi akran vidadon; tio klarigas, kial multjaraj laboristoj ne konservas la taŭgajn profesiajn ecojn de sia juneco.

La ceteraj multtekostaj ŝtonoj: rubenoj, safiroj, topazoj, smeraldoj, turkizoj, grenatoj, ankaŭ estas facetataj en la Jura'a regiono, preskaŭ sammaniere kiel diamanto, escepte ke, por tiuj malpli malmolaj mineraloj, la rado estas el kupro, movata malpli rapide per mano anstataŭ per motoro, kaj ke cementa pulvoro tiam estas la eluzanta materio. Same, cemento anstataŭas la plumbon de la ŝtonportilo, kiu estas pli maldika ol por diamantoj, kaj tenata per mano dum la facetado. Sed la «*Facetado*» kaj «*Polurado*» de la koloraj valorŝtonoj estas du sinsekvaj laborpartoj, dum por diamantoj, tiu duoblaĵo estas farata unufoje.

Ni nur signalu l' imiton de ĉiuj multtekostaj ŝtonoj per densa vitro nomata «*Strass*», kiu, meĥanike facetata, kvankam tre lerte, estas vendata je prezoj nekredeble malkaraj; kaj baldaŭ oni povos vidi la plej modestan esperantistinon ornamitan per diamantaro.... el «*strass'o*»! Kiel ajn, ĉu niaj beletaj samideaninoj bezonas, por esti plaĉaj, novan brilon, nenaturan aŭ realan? Kion ili perdos neniam, kaj kio estas ilia plej belega juvelaro, tio estas ilia rideto, ilia beleta rideto, Sinjoroj.... kiu tiom ofte vin revigis kaj kuraĝigis en via sindono por la sankta Afero Esperanta...

Karaj samideanoj kiuj trapasos lokon, kie estas diamantlaborejo kaj esperantista Grupo, vizitu ambaŭ, l'unuan per helpo de l' dua.

Nun, jen estas listo de la ĉefaj diamantoj, kun nomo de ilia posedanto, kaj kun ilia pezo.

La peztipo por multtekostaj ŝtonoj estas nomata «*Carat*» (kara') kaj ekivalentas je 0 gramo 2025 (preskaŭ kvin karatoj por unu gramo).

La plej dika estas «*Ekselsior*», taksita 25 milionojn da frankoj..... (10 milionojn sm.)

«*Regent*» (de Francujo) valoras 1,8 milionojn, kvankam ĝi pezas nur 136 karatojn (27 gram.) ĉar ĝi estas la plej bela kaj pura en Eŭropo.

«*Bragance*», de l' reĝo de Portugalujo, pezas 367 karatojn aŭ 76 gramojn. Sampeza estas tiu (sennoma) de l' Rajaho de Matam' en Borneo.

«*Orlof*» apartenanta al Caro de Rusujo, pezas 194 karatojn aŭ 39 gramojn (0,9 milionoj da sm.)

«*Florentine*», apartenanta al Aŭstruja Imperiestro, 139,5 karatojn aŭ 29 gramojn.

«*Pitt*», apartenanta al Germanuja Imperiestro, 137 karatojn aŭ 28 gramojn.

«*Koh-i-Noor*», apartenanta al Angluja Reĝo, 106 karatojn aŭ 22 gramojn.

Plej maldikaj, kvankam tamen valoregaj, estas: «*Shah*» kaj «*Sancy*» de Caro, «*Nassac*» de Lordo Westminster, «*Dudley*» de l' Grafo samnoma, «*Paŝao de Egiptujo*» apartenanta al la Kedivo: ili pezas 18-08 gramojn. Unu el la plej famaj smeraldoj estas tiu de l' Papa tiaro, kiu havas 34 m/m da diametro!

Kaj kelkaj detaloj por fini: diamantoj krudaj kun makuloj valoras 30-40 frank. (12-16 sm.) por karato; pretaj por facetado ĝis pezo 1/2 gramo 48 fr. (17,2 sm.); facetitaj kaj helkoloraj ilia valoro estas 1000-1500 fr. (400-600 sm.) por 5 karatoj (proksimume 1 gramo).

Diamantistoj perlaboras 120 ĝis 300 frankojn ĉiumonate (48 ĝis 120 sm.).

Ĉiuj tiuj multtekostaj ŝtonoj estas baldaŭ superataj de novkonata diamanto nomata «*Cullinan*», freŝe donacita al la Angluja reĝo Eduardo VII^a, en lia kastelo de Sandrigham, de landanoj «*Boërs*», el Transvalo, kiel signo de lojalismo. Tiu valorega diamanto, eltrovita en la minejo «*Premier*» dum la jaro 1905^a, pezas 3032! karatojn kaj estas taksita je la valoro 1,500,000 spesmiloj. !!! (3.750000 fr.).

Ĝkzameninte ĝin, la reĝo diris ridetante!

— Se ĝin mi estus trovinta sur mia vojo, ĝin mi estus rigardinta kiel vitropecon, kaj por ĝin preni de la tero, eĉ ne estus altrudinta al mi la peneton.


Efektive ĝi similas nesimetrian bloketon el arabgumo, dika kiel du pugnoj.

Komprenoble ĝi pezos malpli post facetado, kiu okazos dum la venonta marto. Ĝi kuŝas sigelita kaj gardata tage kaj nokte de policanoj. Ĝi estas dudekoble pli dika ol «*Koh-i-Noor*», la plej dika diamanto. El ĝi oni eltranĉos unue

brilanton 800-karatan, kiu estos certe la plej grandkreska kaj kredeble la plej belkolora en la tuta mondo. Pluraj paciencaj labormonatoj dediĉataj al ĝia senŝeligo estos necesaj, por ke estu malkovrita ĝia brilpotenco. Tiu tasko estos komisiata al diamantistoj-majstroj, ĉar plej eta fuŝo estus riĉeca perdo: ekzemple «*Koh-i-Noor*», komisiita al mallertaj poluristoj, perdis duonon el sia pezo.

La deĵorantaj policanoj observados la famulon dum ĝia tuta facetariĝo, kaj fine ĝi estos pesata post ĉiu labora fazo.

La verkinto de ĉi tiu artikolo deziras, ke ĉiuj ĝiaj legontinoj baldaŭ trovu sur sia vojo tiomvaloran, kvankam malbelvidigan, ŝtonon.



MAURICE DAVID.

MOISSAN, LA FABRIKINTO DE DIAMANTOJ EN SIA LABOREJO.

Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET. ⁽¹⁾

MATILDO.

Jes.

srino DE LERI.

Tre beletaj, tre bone, tre beletaj. Reale nur la plataj manikoj estas ŝatindaj; sed longan tempon mi bezonis por kutimiĝi je ili; kaj plie, mi opinias, ke por ilin porti oni ne devas esti tro grasa, ĉar alie oni similas al cikado kun dika korpo kaj maldikaj piedetoj.

MATILDO.

Mi ŝatetas tiun ĉi komparon.

Oni alportas la teon.

srino DE LERI.

Ĉu ne? Rigardu fraŭlinon Saint-Ange (Sankta-Anĝelo). Tamen oni ne devas ankaŭ esti tro malgrasa, ĉar tiuokaze plu nenio restas. Oni admire ekkrias pri markizino de Ermont: mi opinias, ke ŝi similas al pendigilo. Belan kapon ŝi havas, se vi volas, sed ŝi estas madono (2) ĉe finaĵo de bastono.

MATILDO ridante.

Ĉu vi volas, ke mi vin servu, kara mia?

srino DE LERI.

Nur varman akvon kun iomete da teo kaj apenaŭ da lakto.

MATILDO, verŝante la teon.

Ĉu vi morgaŭ iros al Sinjorino de Egli? Mi vin kunprenos, se vi volas.

srino DE LERI.

Ha! Sinjorino de Egli! jen estas alia! kun sia frizaĵo kaj siaj kruroj, ŝi igas min pensi pri la balailoj por forigi la araneojn.

Ŝi trinkas.

Sed, certe, morgaŭ mi iros. Ne, mi ne povas; mi iros al koncerto.

MATILDO.

Estas vere, ke ŝi estas iom stranga.

srino DE LERI.

Rigardu min do, mi petas.

MATILDO.

Kial?

srino DE LERI.

Rigardu min rekte en la vizaĝo, malkaŝe.

MATILDO.

Kion eksterordinaran vi vidas sur mi?

srino DE LERI.

He! certe, viaj okuloj estas ruĝaj, vi ĵus ploris, tio estas videbla kiel la taglumo. Kio estas do, kara Matildo?

MATILDO.

Nenio, mi ĵuras. Kion vi kredas, ke estas?

srino DE LERI.

Mi neniel scias, sed vi ĵus ploris; mi vin ĝenas, mi deiras.

MATILDO.

Kontraŭe, mi petegas, ke vi restu.

srino DE LERI.

Ĉu tre sincere? Mi restas, se vi volas; sed al mi vi diros viajn malplezurojn.

Matildo skuas sian kapon.

Ne? Mi do deiras; vi konscias ja, ke ĉar mi taŭgas por nenio, mi neeviteble malutilas senvole.

MATILDO.

Restu, via ĉeesto estas grandvalora por mi, via spriteco min amuzas, kaj se estus vere, ke mi havas iun prizorgon, via gajeco ĝin forigus.

srino DE LERI.

Vere, mi vin amas. Eble vi juĝas min neserioza; neniu estas tiel serioza kiel mi pri la seriozaj aferoj. Mi ne komprenas, ke oni ludas kun la koro, kaj pro tio mi ŝajniĝas, ke ĝi mankas en mi. Kio estas suferi, tion mi scias; jam tre juna mi estis instruata pri tio. Mi scias ankaŭ tion, kio estas la eldirado de siaj ĉagrenoj. Se la kaŭzo de via malĝojo estas konfidencebla, parolu sentime; ne la sciemo min instigas.

MATILDO.

Mi vin juĝas bona, kaj precipe tre sincera; sed maldevigu, ke mi vin obeu.

srino DE LERI.

Ha, Dio mia! mi divenas! Ĝi estas la blua monsaketo; teruran malspritaĵon mi diris nomante sinjorinon de Blenvilo.

Pri tio mi pensis forlasante vin. Ĉu sinjoro de Ŝavinji ŝin amindumas?

Ne povante respondi, Matildo leviĝas, deturnas sian kapon kaj metas sian naztukon sur siajn okulojn.

srino DE LERI.

Ĉu estas eble?

Longa silento. Kelke da tempo Matildo promenas, poste sidigas ĉe la alia flanko de l' dormoĉambro. Sinjorino de Leri ŝajnas pripensi. Ŝi leviĝas kaj alpaŝas al Matildo; tiu ĉi etendas la manon al ŝi.

srino DE LERI.

Vi scias, kara mia, ke la dentkuracistoj konsilas krei, kiam ili vin doloras. Nu, mi diras al vi: Ploru! ploru! Dolĉaj aŭ maldolĉaj, la larmoj ĉiam kvietigas.

(1) Sekvo. Vidu la Januaran Numeron. — (2) Fr.: madone. Ang. kaj It.: madonna. Hisp.: madona.

MATILDO.

Ha! Dio mia!

S^{rino} DE LERI.

Sed simila afero estas nekredbla! oni ne povas ami sinjorinon de Blenvilo; ŝi estas koketulino duone perdita, havanta nek spritecon, nek belecon. Ŝi ne egalvaloras vian malgrandan fingron; oni ne lasas anĝelinon por diablino.

MATILDO, ploregante.

Mi estas certa, ke li ŝin amas, mi pri tio estas certa.

S^{rino} DE LERI.

Ne, infanino, tio ne estas ebla; ĝi estas kaprico, nedaŭrameto. Mi konas S^{rino} de Ŝavinji pli ol li kredas; li havas malbonan karakteron, sed ne malbonan koron. Kaprice li agis; ĉu vi ploris antaŭ li?

MATILDO.

Ho! ne, neniam!

S^{rino} DE LERI.

Vi saĝe agis; mi konjektas, ke pro tio li estus tre kontenta.

MATILDO.

Tre kontenta? Tre kontenta vidante min plorantan?

S^{rino} DE LERI.

He! Dio mia, jes. De hieraŭ mi estas dudekkvin jara, sed mi scias tion, kio estas multaj aferoj. Kiel ĉio ĉi fariĝis?

MATILDO.

Sed... mi ne scias...

S^{rino} DE LERI.

Parolu. Ĉu vi min timas? Mi tuj rekuraĝigos vin; se, por forigi vian ĝenon, mi devas ion konfidencii pri mi, mi tuj pruvos ke mi konfidas al vi, kaj vin devigos konfidi al mi; ĉu necese? Mi tion faros. Kion vi deziras ekscii pri mi?

MATILDO.

Vi estas mia plej bona amikino; ĉion mi al vi diros, mi konfidas al vi. La afero ne estas tre grava; sed mi obeas la impulsojn (1) de mia freneza kapo. Sen la scio de S^{rino} de Ŝavinji mi estis farinta por li monsaketon, kiun mi intencis doni hodiaŭ al li; de dek kvin tagoj mi lin vidas apenaŭ; li pasigas siajn tagojn en la hejmo de S^{rino} de Blenvilo. Proponi al li tiun donaceton, tio estus dolĉa riproĉo pri lia foresto, kaj montrus, ke li min lasis sola. Ĉe l' momento, kiam mi estis tuj dononta al li mian monsaketon, li eligis la alian.

S^{rino} DE LERI,

En tio estas nenio por plori.

MATILDO.

Ho! ja vere, estas io por plori, ĉar mi faris grandan malsaĝaĵon; mi petis pri la alia monsaketon.

S^{rino} DE LERI.

Aj! tio ne estas diplomatia.

MATILDO.

Ne, Ernestino, kaj li rifuzis.... kaj tiam.... Ha! Mi hontas. ...

S^{rino} DE LERI.

Nu?

MATILDO.

Nu! Mi genue petis pri ĝi. Mi volis, ke por mi li plenumu tiun oferdoneton, kaj mi estus doninta mian monsaketon por la lia. Mi lin petis.... lin petigis....

S^{rino} DE LERI.

Kaj li ne konsentis pri tio; tion kompreneble oni ne bezonas diri. Kompatinda naivulino! li ne estas inda je vi.

MATILDO.

Ha! Malgraŭ ĉio, neniam mi ĝin kredos.

S^{rino} DE LERI.

Vi estas prava, mi malbone esprimas mian penson. Li estas inda je vi kaj vin amas, sed li estas viro, kaj malhumila. Kia kompatindaĵo! kie do estas via monsaketon.

MATILDO.

Ĉi tie sur la tablo.

S^{rino} DE LERI, prenante la monsaketon.

Tiu ĉi monsaketon? Nu! karulino mia, ĝi estas kvarfoje pli beleta ol la lia. Unue ĝi ne estas blua, poste ĝi estas ĉarma. Al mi pruntedonu ĝin; mi prenas sur min la taskon, ĝin ŝatigi al li.

MATILDO.

Penadu pri tio. Al mi vi redonos la vivon.

S^{rino} DE LERI.

Tiel esti post unujara edzeco, tio estas nevidita. Devige sorĉaĵo estas en ĝi. Tiun sinjorinon Blenvilon kun ŝia blukoloro mi malamas de l' piedoj ĝis la kapo. Ŝiaj okuloj estas kvazaŭ bistrumitaj ĝis la mentono. Matildo, ĉu vi volas fari ion? Fari tian provon nenion kostos al ni. Ĉu via edzo venos hodiaŭ vespere?

MATILDO.

Mi ne scias, sed li tion diris al mi.

S^{rino} DE LERI.

Kiel vi estis kiam li eliris?

MATILDO.

Ha! Mi estis tre malĝoja kaj li tre severa.

S^{rino} DE LERI

Li venos. Ĉu vi havas kuraĝon? Mi vin antaŭsci-

(1) Lat.: impulso. Fr.: impulsion. Angl.: impulse. Hisp.: impulso.

igas, kiam mi havas ideon, estas necese, ke mi ĝin ekplenumu senprokraste; mi min konas, mi sukcesos.

MATILDO.

Ordonu do, mi min submetas.

S^{ino} DE LERI.

Pasu en ĉi tiun tualetejon, rapide vestu vin kaj ĵetu vin en mian veturilon. Mi ne volas vin sendi en la balon, sed revenante, vi devos sajnigi, ke vi iris en ĝin. Vi kondukigos vin, kien vi volos, ĉe la « Invalides » aŭ la « Bastille »; eble tio ne estos tre amuza, sed tie vi estos tiel bone kiel ĉi tie por ne dormi. Ĉu konsentite? Nun, prenu vian monsaketon, involvu ĝin en tiun ĉi paperon, mi tuj skribos la adreson. Bone! Jen farite. Ĉe la angulo de l' strato, vi haltigos; vi diros al mia grumo (lakeeto), ke la jenan paketon li tien ĉi alportu, ĝin donu al la unua renkontota servisto, kaj deiru sen alia klarigo.

MATILDO.

Diru almenaŭ, kion vi intencas fari.

S^{ino} DE LERI.

Kion mi intencas fari, infanino, tio estas nedirebla, kaj mi tre baldaŭ vidos, ĉu ĝi estas farebla. Unutoje por ĉiuj, ĉu vi konfidas al mi?

MATILDO.

Jes, ĉion en la mondo pro amo al li.

S^{ino} DE LERI.

Nu, preste (1). Jen veturilo.

MATILDO.

Ĝi estas li, mi aŭdas lian voĉon en la korto.

S^{ino} DE LERI.

Ekforkuru! Ĉu tie estas kaŝita ŝtuparo?

MATILDO.

Jes, feliĉe. Sed mi ne estas kapornamita; kiel oni kredos, ke mi venas el la balo?

S^{ino} DE LERI, demetante la girdandon, kiun ŝi havas sur sia kapo, kaj ĝin donante al Matildo.

Jen, tion vi aranĝos dum la vojiro.

Matildo eliras.

SCENO VII^a

S^{ino} DE LERI, sola.

Genue! Tia virino genue! kaj tiu sinjoro ŝin rifuzas! dudekjara virino, bela kiel anĝelo kaj fidela kiel leporhundo! Malteliĉa infanino, kiu petegas kiel favoron, ke oni bonvolu interŝanĝi monsaketon faritan de ŝi por donaceto de S^{ino} de Blenvilo! Sed

kia abismo estas do koro de viro! Ha! mian fidon, pli multe ol ili ni valoras.

Ŝi sidiĝas kaj prenas broŝuron el sur la tablo. Post momento oni frapas je l' pordo.

Eniru.

SCENO VIII^a

S^{ino} DE LERI, ŜAVINJI.

S^{ino} DE LERI, senatente legante.

Bonan vesperon, Grafa Moŝto. Ĉu vi volas teon?

ŜAVINJI.

Mi vin dankegas, neniam mi trinkas teon.

Li sidiĝas kaj rigardas ĉirkaŭ si.

S^{ino} DE LERI.

Ĉu tiu balo estis amuza?

ŜAVINJI.

Kial tia demando? Ĉu vi ne ĉeestis en ĝi?

S^{ino} DE LERI.

Jen demando kiu ne estas amindumema. Ne, mi ne estis en ĝi; sed tien mi sendis Matildon, kiun viaj rigardoj ŝajnas serĉi.

ŜAVINJI.

Vi ŝercas, laŭ tio kion mi vidas.

S^{ino} DE LERI.

Kiel? mi petas pri pardono; mi tenas artikolon de revuo, kiu multe min interesas.

Silento. Ŝavinji, maltrankvila, leviĝas kaj promenas.

ŜAVINJI.

Ĉu Matildo vere estas en tiu balo?

S^{ino} DE LERI.

Sed jes, vi vidas, ke mi ŝin atendas.

ŜAVINJI.

Tio estas stranga; ŝi ne volis eliri, kiam vi tion proponis al ŝi.

S^{ino} DE LERI.

Ŝajne ŝia intenco ŝanĝiĝis.

ŜAVINJI.

Kial ŝi ne tien iris kun vi?

S^{ino} DE LERI.

Tial ke mi jam ne deziris, tien iri.

Dairigota.

*Tradukita de
JOHANINO FLOURENS,
H. M. de la E. Vagabonda Klubo.*

(1) Fr.: preste. — Hisp. kaj it.: presto.

La fino de la jaro estas ĉiam epoko malriĉa pri sportaj okazintaĵoj. La bela vetero forflugis depost longatempe, kaj nur la futbalo estas en plena agado. Sed, tiun ĉi jaron, nenio rimarkinda en tiu ĉi fako; nek Sud-Afrikanoj, nek Nov-Zelandonoj venis en Eŭropon; kaj por la nespecialistoj, kompreneble, la «maĉoj» inter ekipoj (*teams*) samnaciaj ŝajnas iom palaj, kontraŭe je la internaciaj konkursoj, kiuj ĉiam pasiigas la sportistan mondon. Rilate al la luklado (manbatalo) ĉiam la samaj komercaj kaj ne sportaj aferoj altiras en la muzik-halojn nur la amason de la kredemuloj, kiuj ne ankoraŭ povas enigi ensian cerbon, ke ĉio ĉi estas nur komedio, kies roloj estas lernitaj, kaj kies rezultato estas antaŭe certa. Per la energia reklamo de la organizantoj, ni havas samtempe tri aŭ kvar ĉampionadojn de la mondo. Estus tempo, ke oni ne plu moku la publikon! sed, kial ĝi daŭras iri al tiuj ĉi spektaklaĵoj? Oni pretendas, ke la organizintoj, tiun ĉi jaron, plendas iom rilate la enspezon pli malaltan ol kutime! Ne estas ni, kiuj kompatos la ĉagrenon de la malfeliĉaj ekspluatistoj, ĉar tio pruvus ke la sporta edukado de la popolo iom post iom progresadas.

Kiel kutime, la fino de la lasta kaj la komenco de la nova jaro vidas starantaj multajn ekspoziciojn de aŭtomobilismo nomatajn «salonoj». La ĉefaj estas la pariza kaj la londona. Precipe tiu de Parizo estis ankoraŭ pli bela ol kutime, ĉar estis la deka jubileo de la ĉiujaraj aŭtomobilismaj salonoj.

Inter aliaj aferoj oni povas rimarki interesplenan retrospektivan ekspozicion de la veturiloj depost la unuaj provoj; la unuaj tricikloj je vaporo, kaj petrolo de markizo de Dion depost 1883, estis tie. Tie ankoraŭ la «gajnintoj» de Paris-Berlin 1901, Paris-Wien 1902, Paris-Bordeaux (Madrid) 1903, Gordon-Bennett Pokaloj 1904-1905 k. t. p. Tre, tre interesplena tiu ĉi fako!

Rilate al la industrio mem, ni vidas kun plezuro, ke la konstruistoj direktas sin al la praktikeca vojo. Multe da ŝarĝveturiloj, motor-busoj, boatoj; fondo de nova franca societo por konstruado de ilmaŝinoj. Interesaj provoj por uzado de petrol-oleo kaj koaksa gaso por la industriaj veturiloj. Ankaŭ tre rimarkinda, nova rotativa motoro de firma Burlat, de Lyon.

Kaj la veturileto! demandas multaj legantoj, kion vi pensas pri ĝi? Ĉu ĝi estas nune praktika, ĉu ĝi estas nune bone konstruata? Ĉu ĝi estas malkara? Al tiuj ĉi amikoj mi respondas: Jes la veturileto estas nune perfekta ilo, se vi ĝin aĉetos al unu el la kvin aŭ ses bonfamaj firmoj; ĝi estas praktika, sed... bedaŭrinde ĝi estas tre kara, la prezoj altiĝis. Se vi volas akiri ion bonan, estas necese elspezi almenaŭ 4000 frankojn (1580 sm.). Sed se vi aĉetos pli malkare, vi havos nur malbonan maŝinon, kiu kaŭzos al vi nur enuojn.

Rilate al la funkciadaj elspezoj de tiu maŝino 8/10 m. ĉ., oni devas kalkuli por la tuto, (esenco, oleo, pneŭmoj, riparoj k.t.p.) 8 sd por unu kilometro. Vi pensas: Tio estas kara! — Ne, amikoj! tio ne ŝajnos kara, se vi iom pripensos pri la duonspesmito aŭ la spesmito, kiun kostus al vi la kilometro per peza salon-aŭtomobilo 24/40 m. ĉ.

Aĉetu vian maŝinon kun duobla ekbrulig-aparato (magnet-aparato kaj akumulatoroj), almetu dikajn kontraŭglitantajn pneŭmojn al la malantaŭaj radoj, kaj tiel provizita, via maŝino estos por vi bona kunulo, kiu neniam haltos nevole sur la kruta vojo, se vi ne timas zorgi ĝin sufiĉe.

Pri la motorecikloj kaj cikloj mi ne vidis novaĵojn. Nur, pli kaj pli, inklino al la malpeza motoreciklo, laŭ la vojo montr-

ita al ni depost longatempe per la fama Ĝeneva firma Moto-sacoche. Ĉiam la samaj bicikloj en la francaj fakoj krom la tre malmultaj inteligentaj fabrikistoj, kiuj penadas por kontentigi la klientaron de veraj cikloturistoj. Estas por ni plezuro citi la firmojn Terrot el Dijon kaj Magnat et Debon el Grenoble. Tiuj ĉi firmoj havas specialajn taŭgajn modelojn kontraŭe la plimulto, kiuj alprenas nur la anglan sistemon de la ŝanĝilo de rapidumo en la aksingo. Verdire, tiu ĉi sistemo donas bonajn rezultatojn, sed, laŭ mia juĝo, ne estas sufiĉe da interspaco inter la rapidumoj.

Ni ne forgesu citi la plej gravan sukceson atingitan ĝis hodiaŭ de la aera flugado. S^{ro} Henri Farman per sia nova aersplano sukcesis surflugi buklon fermitan inter du fostoĵoj interspacitaj de 1 km.

Tio estis la nepra kondiĉo por gajni la premion de 50.000 fr. (20.000 sm.) Deutsch-Archdeacon. Ni memorigas niajn samideanojn, ke S^{ro} Archdeacon, la pioniro de la maŝinflugado, estas nia simpatia esperantista amiko, prezidanto de la Grupo de l' Kastelo de la Popolo (Popolaj Universitatoj) en Parizo. Hura! por S^{roj} Farman kaj Archdeacon!

L. DE GUESNET.

Ano de l' Internacia Scienca Asocio.

Vintraj ludoj.

La glacio, la blanka neĝo ludas gravan rolon, kompreneble, en la vintraj ludoj. Kiel sekvon al la interesa artikolo de nia amiko Th. Hopf, kaj al la artikoleto de nia afabla kunlaboranto Ploussu, ni enpresas hodiaŭ kuriozan bildon, prezentantan skulptaĵon el neĝo, ĉizitan per ŝoveliloj en improvizita marmoro.

Komerca publikigado.

LA « FINANCIAL NEWS ».

Profitoj komparataj de la publikigado per la Gazetaro kaj de tiu per prospekta sendo: pariĝa juvelisto sendis 20.000 katalogojn, kio kostis 2.295 fr., alkalkulante la kostojn pro poŝtmarkoj, adresoj, kovertoj; li ricevis 29 respondojn, sekvitajn de vendoj liverintaj netan profilon je 495 fr. La sama firma elspezis 1.700 fr. anoncante per gazetoj: ĝi ricevis 1.100 respondojn, efektiviĝis 364 vendojn, kaj faris netan profilon je 3.760 fr., nome 221% el la sumo elspezita anonce.

Kio estas vera por la publikigado per naciaj lingvoj devas esti tia ankaŭ rilate la reklamadon per Esperanto. Por tio estas necese, ke la samideanoj interrilatu kun la progresemaj firmoj, kiuj kuraĝas provi la uzadon de Esperanto por sia publikigado. Tio kuraĝigos ilin daŭrigi tiun iniciaton, kaj ilia ekzemplo instigos aliajn komercistojn simile agi.

Por tiu lasta celo estas necese, ke ĉiu grava grupo havu komitatanojn speciale komisiitan por la komerca propagando, kaj penantan instigi kelkajn gravajn firmojn reklami per la ĉefaj Esperantaj gazetoj.

Ni donacas 25% kiel maklerajon al ĉiu persono, kiu havigas al ni anoncojn. (Vidu la tarifon sur la 2^a kovrila paĝo).

Kiu havigas al ni 6 abonojn, kaj sendas ilin senpere al ni, ricevas sepan senpage.



Novaj gazetoj. — *Tutmonda Espero*, organo de la kataluna esperantistaro (3 fr. jare) ĉe S^{ro} Mikaelo Cases — Paradis, 12, 1^o — Barcelona.

Germana Esperanto Gazeto en Magdebourg, 2 sm. ĉe S^{ro} E. Stark, Magdeburg, Kaiser Friedrichstrasse, 1.

Estlanda Esperantisto, 1,60 sm. ĉe S^{ro} J. A. Rahamägi, Revel, Weike Kalamaja uul. 7, k. 2. (Rusujo).

Le Phare Sténographique, 1,60 sm. 60, Rue des Carmes, Rouen (Francujo).

Korajn dezirojn al ĉiuj.

En « The Theosophie Messenger » grava artikolo de S^{ro} Albert P. Warrington: Esperanto kiel rimedo por universala frateco.



VINTRA INFANA SKULPTAĴO.

Duonsurda. — Ni reprenis aparte tiun ĉarman komedion, kiu forigas mankon en nia esperantista teatro: ĝis nun, ĝi ne enhavis originalan verkon por gejunuloj. La sukceso de *Duonsurda* dum la unua tutmonda Zamenhof'a festo, en Agde, pruvis, ke tiu unua provo estis tute sukcesinta sur la scenejo, same kiel ĝi tute plaĉas je la legado.

Ni ne bezonas atentigi niajn legantojn pri la stila pureco kaj la karakteriza spriteco de nia talenta kunlaborantino. Sed ni konigos al tiuj, kiuj ĝin nescias, ke Johanino Flourens estas ankaŭ fervora propagandistino. Ŝi specialiĝis en la propagando ĉe la literaturistoj francaj: niaj gelegantoj ne forgesis la intereson de la impresiga novelo «*La torrento el Saŭmo*» de la fama verkistino *Daniel Lesueur*. *Jules Claretie*, *Henri Lavedan*, *Ernest d'Hervilly*, *François Coppée*, *Henry Houssaye*, *Jacques Richepin*, *Halpérine Kaminsky*, *Dro Dumas* kaj aliaj skribis al nia kunlaborantino leterojn, kiuj pruvas la sukceson de ŝiaj penadoj.

Duonsurda sin prezentas sub ĉarma vestaĵo, dank'al la talento de alia el niaj gekunlaborantoj, ankaŭ favore konata de niaj gelegantoj: *Fino Oxenford*, prezidantino de *E. Vagabonda Klubo*, kies membrino estas J. Flourens.

La verko, unua el niaj apartaj eldonaĵoj, estas do ankaŭ pruvo de la lerteco de niaj Vagabondaj geamikoj. Ni ĝin eldonis tre malkare, ne kiel mongajnilon, sed kiel amuzilon por la klubaj kunvenoj kaj festoj. (30 c. — 12 sm. — ĉe «*Tra la Mondo*» aŭ ĉe Johanino Flourens, 2 rue Abélard, Béziers, France).

En «*Internacia Scienca Revuo*» (Februaro), tre kurioza artikolo de nia klera kunlaboranto Ch. E. Randall: «*Potenco rekte el la suno*», en kiu la aŭtoro priskribas atentindan aparaton por utiligo de la sunpotenco. Se la provoj sukcesus oni eble rehavigus vivon al regionoj nune dezertaj. Tiaj aparatoj estus tre utilaj en regionoj ne havantaj karbminejojn, kaj kie, aliparte, arbaroj jam ne ekzistas pri la kaŭzoj interese elmontrita de Sr^o Ch. E. Randall en nia lasta N^o. Ni rekomendas, en la sama N^o, artikolon pri verkado de teknikaj vortaroj; ĝi interesas ĉiun el ni, ĉar ĉiu el ni sin okupas pri ĉi aŭ aliaj teknikaj.

La Vagabonda Monataĵo, oficiala organo de E. V. K. jam aperis dufoje: januare kaj februare, kaj promesas esti interesa. Ĉiu numero enhavas originalan verkon de E. V. K. — kluban raporton, spritan «*redaktoran babiladon*», priartajn sciigojn, kluban raporton, raporton pri la agemeco de la klubanoj...

Ambaŭ kajeroj aperis sub ĉarmaj kovriloj. La abono kostas 3 fr. (1.25 sm.). Oni povas ĝin ricevi eĉ ne estante klubano.

Sr^o Hulmes, pentristo, deziras korespondantojn por interkonsiliĝi kun li pri la teknikaj vortoj pri pentrarto.

Kolektivaj abonoj al gazetoj.

Multe da personoj, kiuj dezirus legi la internaciajn gazejojn, kvankam ne povante ilin aboni, plendas pro maloportuneco aŭ komplementa neorganizado de grupaj bibliotekoj. Jen modelo proponinda al la kluboj neorganizitaj, aŭ al aroj de personoj nesufiĉe multaj por fondi klubon,

«*Jen kiel ni organizis niajn grupojn da abonintoj al Tra la Mondo*. Ĉiu grupo kalkulas 5 personojn, el kiuj ĉiu konservas la gazeton dum 15 tagoj (2 semajnoj). Tiu, kiu ĝin ricevas unuavice pagas 3 frankojn (1.20 sm.) jare; la 2^a, 2 fr.; la 3^a, 1.50 fr.; la 4^a, 1 fr.; la 5^a, 0.50 fr. La gazeto restas la propraĵo de la loka societo kaj restas en la biblioteko, ĉe la restoracio, kie ni kunvenas.»

Mi esperas, ke la proksiman jaron la nombro je la grupoj pligrandiĝos, ĉar la abonintoj estas tre kontentaj pro via gazeto.

*El letero de la Sekcio de la grupo de
La Chaux-de-Fonds (Svisujo).*

Per tiu lerta organizacio la anoj de la grupetoj povas legi sen trorapideco la gazeton, kiu poste eniĝas senpage en la kluban bibliotekon, por esti utiluzata, laŭcirconstance, por la propagando, kaj la paroladaĵa aŭ rakontaj ekzercoj. Tiu organizacio ŝajnas tre rekomendinda kaj koniginda.



JUNAJ ESPERANTISTAJ GERMANOJ.



Fot. A. Wildt.

JUNAJ ESPERANTISTAJ BOHEMINOJ.

C. Budejovice.

ESPERANTO KAJ LA JUNULARO. — TRIA SERIO.

La grupoj en liceoj, gimnazioj, pli kaj pli multiĝas.

Ni ne tro sciis insisti pri la graveco de tiu agado, ĉar la nuna junularo estas la ĝermo de disvastigonta estonta generacio. En tiun ĝermon ni devas inokuli la Esperantan viruson, por ke ĝi trakuru la estontan sukcon.

Juna samideano, kiu tuj esperantigita klopodis al la gejunuloj kaj fondis la gazeton «*Juna Esperantisto*» kun Sr^o H. Hodler, Sr^o Edmond Privat, faras nun ageman propagandon ĉe lernejoj en Usono. Jus fondiĝis la jenaj kluboj de gejunuloj: *New-York*, Fraŭlino Elsie Breitenfeld, 221 East 68 str.; *Providence* (R. I.), Sr^o S. O. Brown, 599 Broad Street. (U. S. A.). Niaj junaj legantoj, almenaŭ la prezidantoj je la nomo de siaj grupanoj, interrilatu kun tiuj novaj amikoj. En *Sao Paulo*. (Brazilujo) ankaŭ fondiĝis (II-XI. 07) geknaba klubo: «*Juna Esperantisto*». Ni signalu ankaŭ Rondeton de studentoj esperantistaj en *Hradec Král.* Bohemujo.

Ni donas ĉi supre portretojn de junaj germanoj kaj de junaj boheminaj. La unua grupo iniciatis, la lastan jaron, kun

Sr^o Viĥert, la unuan Esperantan German-Slavan kongreson en Allenstein (Prusujo).

Nun Sr^o Viĥert, prezidas «*Internacian Unuiĝon de Studentoj*» kiu celas unuiĝi ĉiujn junajn fortojn por la venko de Esperanto.

Ni multe konsilas al niaj junaj amikoj, al la parencoj, ke ili atentu pri tiu unuiĝo: Sr^o Wiĥert, stud arĥ, Germanujo, Berlin N. W. 23 Altonaerstr. 18. gth. hpt. (Enskribo 1 fr. 50). Organo «*Esperanto*» 2 fr. jare).

Alia rimedo por atingi la gejunulojn estas varbi la instruistojn. Sr^o Ch. E. Cowper, prez. de la *Instruata Komitato de la B. E. A.*, 13. Arundel-street, Strand, London, W. C. preparas, ĉe la kvara, specialan kunsidon de instruistoj, profesiaj aŭ neprofesiaj, de Esperanto. La interesatoj sin turnu al Sr^o Cowper.

Al la personoj, kiuj celas varbi la edukistaron al Esperanto, ni konsilas la uzon de nia internacia enketo pri edukado, la plej taŭga rimedo por montri, kian intereson havas nia lingvo por koni tion, kio fariĝas fremdlande.

NUNTEMPAĴOJ

NOVA JARO — FERVORO NOVA!

Ni ricevis de S^{ro} Alekso Fanzeres belan poŝtkarton surhavantan la standardojn brazilan kaj Esperantan el ŝtofoj, ornamitajn per briletaĵoj kaj kunigitajn per silkubandeto.

Estas legeblaj la vortoj: **Nova jaro. — Fervoro nova!** *Vivu nia majstro. Vivu Esperanto.* Fine: Per la fama « Tra la Mondo » mi salutas la gesamideanaron!

Mi fieriĝis, esti elektita por transsendi tra la mondo tiun saluton, kiu montras al kelkaj ilian devon: **Nova Jaro. Fervoro nova!**

Efektive la interkonsento dezirita ne okazis, kaj restas, unuj kontraŭ la aliaj, la reformemaj kaj la fidelaj. Kvankam bedaŭrinda, tio ne devas nin timigi. Kiel diris D^{ro} Zamenhof en Kembriĝo « Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun por ni, ĉar tiu sama forto de inercio, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem nun ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus. »

La multaj aprobaj leteroj, kiujn mi ricevis pri mia lasta artikolo, montras, ke grandega plimulto ne volas halti, kaj ke **Nova Fervoro** plenigas la spiriton kaj la koron de ili.

En cirkulero « al ĉiuj esperantistoj », tro longa por esti tie ĉi represebla, D^{ro} Zamenhof klarigas tion, kio okazis, kaj laŭ koincido inda je rimarko, uzas la samajn vortojn kiujn mi uzis, instigante al la unueco kaj *disciplino*, aŭ defendante la Lingvan Komitaton.

Mi legis plezure en « Internacia Scienca Revuo », ke « forta plimulto » el la respondoj al la alvoko presita en nia bonega kunfrato « staras vigle kontraŭ la enkonduko de gravaj reformoj en nian lingvon. Tia estas ankaŭ la spirito lau kiu estis farita la alvoko al la Delegitaro, ĉar, kvankam la laboroj de la Delegitaro estas tre interesaj kaj atentindaj, precipe por scienculoj, logikistoj kaj lingvistoj, oni ne devas forgesi ke tiuj laboroj estas ĉefe teoriaj. »... Kaj ke ili ne kontentigas la plej reformemajn! ĉar en « Belga Sonorilo », post longa diskuto pro la proponoj de *Ido* pri la sufikso *ig*, ni legas « ni ne konsideras ilin kiel plene kontentigaj. »!

Tio sufiĉas por montri la abismon, en kiu nin kuntirus, se ni ilin sekvus, la logikegemoj, kies serĉoj havus kiel rezultaton senigi Esperanton je la elasteco, kiun ĝi ŝuldas al genia elpenso.

Jen cetere, inter multaj aliaj, bonega pruvo de la emo de la esperantistoj ne iri en la abismon:

« 1^o La sola lingvo propagandata de la Svisa Esperanta Societo estas la lingvo *Esperanto* tia, kia ĝi estas difinita per la tradicio kaj la ĝisnuna verkaro.

2^o La lingvo devas pliperfektigadi iom post iom laŭ la vojo montrita en la antaŭparolo de la *Fundamento de Esperanto* kaj neniel per verkoj pure teoriaj aŭ komitataj decidoj ».

Ni plezure legis, inter la subskriboj de tiu deklaro la nomon de S^{ro} H. Hodler, direktoro de « Esperanto-Journal ».

Restas do tre malmulte da reformaj partianoj.

A. MONTROSIER.

Mortigo de l' Portugala reĝo.

Reĝo Karlos kaj kronprinzo, dom Ludoviko-Filipo de Braganĉo estis malinde mortigitaj la 1^{an} de februaro. Vera pafado kuŝigis ilin unu sur la alian, kaj nur mirakle infanto Manoelo kaj reĝino Amelio ne ankaŭ mortigis.

La nova kaj juna reĝo, Manoelo II, forigis de la regado ministron Joao Franko kaj intencas leĝe regni. Ĉiuflanke lojalemaj adresitaĵojn alvenas al li. Cetere la malbrava atenco instigis ĉie grandan emocion kaj malaprobajn kriegojn.

Karakterata duobleco de Abd el Aziz.

Samtempe kiam li petis la helpon de Francoj, Abd el Aziz sin turnis al Germanujo. Tiu ĉi ŝtato sciigis Francujon pri tiu ago ne konforma al la akto de Alĝiras. Tiu fakto sufiĉas por pruvi al la iluziemoj, kian konfidon oni povas havi en la sultano maroka!



ABD-EL-AZIZ.

El diversaj landoj.

MANILA. S^{ro} Cameron Forbes, pri kies esperantista fervoro ni raportis en nia lasta N^o, verkis speciale por nia bonega kunfrato « Filipina Esperantisto » interesan artikolon pri: praktika metodo por lingvolernado. Tre bela portreto de S^{ro} Forbes troviĝas en la Dec. N^o de la gazeto.

Estas rimarkinde, ke niaj Filipinaj amikoj kaj tiea kunfrato sukcesis varbi la aŭtoritatojn de la insulo por nia afero.

Ni jam donis pri tio sciigojn. Jen nova, kies gravecon komprenos niaj legantoj:

S^{ro} Shuster, Ministro de Edukado, al kiu D^{ro} H. W. Yemans montris « Tra la Mondo », dirante ke mi deziras dediĉi kelkajn pagojn al Manila, precipe al lernejoj, opiniis la ideon interesa kaj tuj esprimis la deziron verki mem la artikolon. Ne estas necese insisti pri tiu valora estimo al Esperanto; ni povas ankaŭ fieriĝi pro la konsidero tiel donita al « Tra la Mondo ».

De la tago, kiam ni eksciis tiun agrablan novaĵon de D^{ro} H. W. Yemans mem, ni ricevis « Filipina Esperantisto », en kiu ni legis anoncon pri tiu artikolo kun la jenaj linioj, kiuj pravigas tion, kion ni ĵus diris:

« Artikoloj tiaspecaj, publikigitaj en gazeto, kiu trairas la tuton de la Esperanta lando, kaj estas aĉetebla en la ĉefaj urboj de la kontinento, estos tre utilaj, por klerigi tiun mondparton, kies ideoj estas ankoraŭ tre konfuzaj pri tio, kio efektiviĝis en niaj insuloj ».

Ni konsilas multe al niaj legantoj, ke ili uzu « Tra la Mondo », laŭokaze, por propagandi al la sialandaj aŭ siaurbaj eminentuloj, utiligante la gazeton al ĝia celo. Tia monro estas neniam senfrukta por nia afero. Jen nova pruvo:



Premio al niaj gelegantoj.

HISpanUJO; RUSUJO: SIBERUJO, KAŬKAZO, FINNlando, kaj CENTRAJ PROVINCOJ; SVEDUJO; BULGARUJO; GERMANUJO, PRUSUJO; FRANCUJO; USONO; AŬSTRUJO: GERMANA, BOHEMUJO, MORAVUJO

konas kaj ŝatas la bonegan

POŝHORLOGO "L'ESPERO"

dank'al « Tra la Mondo ». Ni ĝojas pri tiu kontentiga rezultato, kiu montras la efikecon de *Esperanta Komerca Publikigado* en gazeto disvastiginta *Tra la Mondo*.

Por SINJOROJ : 30 fr. = 12 Sm. — Por SINJORINOJ : Ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.

AŬSTRALIO. « Mi vidigis *Tra la Mondo* al S^{ro} R. Philp (elp. Filp) la nuna Ŝtata Ĉefministro (ni nomas la tenanton de tiu ofico *The Premier*, t. e. la unuulo en la ŝtato), kaj donis al li la ekzempleron enhavantan mian artikolon pri Brisbane. Li ŝatis ĝin tre multe, kaj demandis al mi sciigojn pri la lingvo ».

El letero de S^{ro} P. P. Fewings (Aŭstralio).

Certe nia amiko ne perdis sian tempon vizitante *The Premier*. Ni ne scias, ke oni utiligis tiel la numerojn de nia gazeto, kiuj enhavis prinoticojn kaj portretojn de la gereĝoj brita, norvega, hispana aŭ de la prezidanto de la franca respubliko. Tamen la tri cititaj reĝoj, estus emaj, oni diras, al Esperanto. La montro, ke Esperanta organo sin okupas pri ili, povus nur igi ilin pli favoraj, precipe se oni konvinkus ilin, ke nia lingvo ne estas nur uzata por batali kontraŭ ili, kio estas la timo de kelke da ili kaj da ŝtathomoj, ministroj, k. a.

La kovrilo de la lasta « Internacia Socia Revuo » povas nur disvastigi tiun falsan ideon. Nia estimata kunfrato estas en sia rolo, farante propagandon por speciala intereso; tiuj, kiuj ne zorgas pri tiu celo devas agi, por ke tia speciala propagando ne malutilu la ĝeneralajn interesojn de la homaro.

JAPANUJO. « La respondkuponoj estas akceptataj kaj

aĉeteblaj en Japanujo, Koreujo — en kiu estas japanaj poŝtoficetoj preskaŭ ĉiuloke, kaj ĉiuj japanaj poŝtoficetoj en Ĥinujo. Nia asocio ankaŭ akceptas ilin por la abonpago ».

El letero de S^{ro} T. Ĉif, ĉe Jap. E. Asocio.

Jen sciigo valora, kiu faciligos interrilatojn kun niaj progresemaĵoj samideanoj.


BOHEMUJO. La Asocio de bohemiaj esperantistoj, kiu kunligas ĉiujn bohemiajn societojn organizis « Rondirantan Ekspozicion » el esperantaĵoj por Bohemoj. Sendi ĉiujn dokumentojn al S^{ro} Frant. Svaĉina, instruisto en C. Budejovice, Jirovcova ul. 38 (Bohemujo).

BULGARUJO. La societo Tirnova: *Lumo* preparas ankaŭ ekspozicion por la bulgara kongreso. Oni sendu dok. al Sinjoro Iv. Nenkov, str. S. Gorska 2299, V- Tirnova, Bulgarujo.

BRAZILUJO. « En Sao Paulo estas 4 grupoj, *Espero Katolika* (21. VII. 07), *Matena Stelo* (virina, 11. VIII. 07), *Espero* (virina, 15. IX. 07), *Juna Esperantisto* (14. XI. 07).

Mi faras propagandon per la katolika ĉiutaga gazeto Sao Paulo... » El letero de S^{ro} Haraldo Amaral.

Konkurso pri Historio sen paroloj. 3^a Premio. (Vidu la Ĥan Non).



LA NULLI SECUNDUS.

Tiu vidaĵo de la angla direktlebla, kiun ni ne povis enpreni januare pro manko de spaco, kompletigas la interesan artikolon de S^{ro} M. Finol.

En banujo jen dikulo,
Sur tabulo el(e)gantulo.
Tiu tenas, dum li naĝas,
Cigareton. Kaj li petas
De l' amiko alumeton
Por bruligi cigareton
Kaj en bano ĝin fumadi :
Vaporŝipon imitadi.

El(e)gantulo proksimiĝas
Sur tabulo; ĝi fleksiĝas
Per la pezo de l' dikulo
Sin tenanta per tabulo.
El(e)gantulo, el(e)gantulo,
Gardu vin de la dikulo !
Vi ne scias kia forto
Loĝas en tabul' risorto ?

Tro malfrue ! — La tabulo
Saltas supren. El(e)gantulo --
Jen li flugas tra l' aero.
Granda estas la mizero !
Belaj vestoj, ĉapeleto,
Kaj la bela hometeto, --
Ĉio jen malsekigota
Kaj la viro eĉ punota,
Se pri tio la patrino
Aŭdas, kaj la fianĉino.

Aliaj sekvos.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



FLOR ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas do la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn.

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO

VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark **Marque Déposée**

N° 270,042 N° 13,195

Registered Label N° 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C°

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).

Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Sciencia Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesimiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Sciencia Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & C^{ie}* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).



LEGU:

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ. — DUONSURDA.

Vidu la 4^{an} kovrilan pagon.

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj
ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.

(Internacia esperantista libbrejo)

Skribu LEGBLE — Rememorigu ĈIAM pri via adreso.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Eho Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita Of. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Marich Agoston, Budapest IX. Ŭlői-ut 59. IV, 8.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

The American Esperanto Journal. — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3 k. por Aŭstrio. Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Esperantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — No 1a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.) Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjačeskaja, 24, al la S^{to} « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (España).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEMJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. *Petu specimenon.*

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^o mankas la Aprila N^o. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^o mankas la Aprila kaj Maja N^ooj. 2,40 Sm.

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de

FRANÇOIS COPPÉE.

Ano de la Franca Akademio.

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier. 75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.

RESTORACIO Bona familia kuiraĵo je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

ANONCAGENTO. C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à
LA PLUS SIMPLE des langues suivant
LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.).
Franco: Belgique, fr. 1.35.—Etranger, fr. 1,50
VERVIERS, Place Verte, 20.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,

33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skriblitoj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendas, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.